

esperanto



MARTO 1992 • 85-A JARO • N-RO 1035 (3)



Ĉu ni silentu?

Enhavo

- 41 Politiko: Ĉu ni rajtas silenti? (Renato Corsetti)
- 42 Por la defendo de etnaj lingvoj kaj kulturoj
Esperanto sur la parlamentaj tagordoj
Verduloj inter la verduloj
- 43 Ĉu interpopola aŭ interesperantista kompreniĝo?
(Elisabeth Schwarzer)
Alvoko al la civitanoj de Eŭropo por tuteŭropa interkonsento pri la lingva problemo
Esperanto kiel politika (mis)argumento
- 44 Kongresa Komunikado 2 de la 77-a Universala Kongreso en Vieno
Nova koncepto por la 15-a Esperantologia Konferenco
Helpi aligi junulojn al IJK
- 46 La membraro de UEA en 1991
- 47 Informado: Seminario semis, ĉu regionoj rikoltos? (István Ertl, Ivo Durwael)
- 48 Scienca aplikado: Etera temaro, faktecaj prelegoj: La Unua Rusa Sesio de AIS (Dan Maxwell, Fabrizio Pennacchietti)
- 49 Kalendaro 1992 (internaciaj Esperanto-aranĝoj dum la kuranta jaro)
- 54 Recenzoj: *Maria kaj la grupo*, *La longa vojo*, *La granda aventuro kaj aliaj noveloj* (Georgo Kamaĉo); Serio "Originala literaturo klasika" de la Fondaĵo Pro Esperanto (Wojciech Usakiewicz); *La vila mano / Idoj de Cereso*, *Inferio* (Osma Buller)
- 57 Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
- 60 Nekrologo: William Solzbacher

Vi trovOS

ke, por komplezi al Viaj okuloj, ni iom grandigis la literojn de niaj ĉefaj tekstoj. Nu, ili tamen ne estos

de tiu ĉi grandeco,

ĉar la informoj bezonas spacon. Aliflanke, se ni enmetus ĉiujn ricevitajn informojn sen mallongigo,

vi konstante bezonus lupon por legado.

La literoj do kreskis iomete, de jeno al jeno. Ni atendas Viajn reagojn.

Esperantistoj havas sian opinion en nur pli liter-grandeco. Renato Corsetti kaj Elisabeth Schwarzer, ekzemple, pensas ke ni estas *tro* neŭtralaj (p. 41-42.). Apud la iliaj, pluraj politikaj starpunktoj atendas Vian aprobon aŭ rifuzon. *Kongresa komunikado* (kaj eĉ la recenzoj), pri dek du verkoj eldonitaj en nia kongresurbo) atentigas Vin ne maltrafi la rendevuon kun Mez-Eŭropo. Aŭ ĉu Vi elektos aranĝojn en aliaj mondopartoj, el la tut-jara *Kalendaro*? Mi mem revas levigi de la redaktora tablo, kaj migre raportu pri unu aranĝo post la alia, en nia tutgloba Esperantujo...

La kovrilo: morna mesaĝo, alarma averto de Francisco Veuthey.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voclegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 55,12; US\$ 27; GM 48; enoj 3960; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,00 guldenojn.

Anoncarifoj (gld.): 1 p. 1760, 1/2 p. 970, 1/4 p. 540, 1/8 p. 300, 1/16 p. 170. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tujaj ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefaksaj: +3110 436 17 51.

Teleksaj: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osma Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefaksaj (071) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, ul. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-W-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Ian Jackson, 29 Graham Road, London W4 5DR, Britio; tel. (081) 995 6244; teleksaj 8959991 caward g; telefaksaj (071) 726 8561.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2650 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj telefaksaj (02) 646 5413.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Stimec, Nova Ves 87, CRO-41000 Zagreb, Kroatio; tel. (041) 42 92 51; telefaksaj (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Stefan MacGill, Eső u. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario; telefon-mesaĝoj kaj telefaksaj per HEA, (1) 15 60 244.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): f-ino Saskia Idzerda, Bruchwiesenanlage 4 Zi. 801.4, D-W-6602 Dudweiler, Germanio; tel. (06897) 765402.

Ĉu ni rajtas silenti?

La artikolon "Lanĉo de la politika esperantismo" (dec. '91) la redaktinto erare atribuis al Renato Corsetti. Efektive ĝi, nome de la "Esperanto" Radikala Asocio, estis verkita de la politika respondeculo de ERA-KODO, la sekretario Giorgio Pagano. La jena opiniesprimo estas de s-ro Corsetti.

Kia peno, karaj geamikoj!

En momento en kiu la mondo estas trakturata de amaso da malbonaĵoj, militoj, rasaj malamoj, sociaj premoj, manko de manĝaĵoj kaj atako al bakejoj, kiel en la mezepoko, la Esperanto-movado ŝajnas ne elmeti vorton.

Mi pro personaj kialoj restis ĉe la rando de la internacia movado, kvankam aktiva enlande, dum iom da jaroj. Nun mi abrupte vekigis, rigardis ĉirkaŭ mi, kiel homo endormiĝinta dum jardekoj, kaj vidis ke la plej bonaj Esperanto-inteligentuloj dediĉas siajn energiojn al aĵoj, kiuj ŝajnas al mi, ni estu klaraj, "stultaĵoj". Volonte mi aŭdas argumentojn, kiuj malpravigus min. Iuj inventas novajn vortojn por eterniĝi en la venontaj eldonoj de PIV, iuj kontraŭargumentas, aliaj starigas literaturajn skolojn por si kaj siaj tujaj najbaroj, pluraj provas profiti el la restaĵoj de tiu, kiu estis unu el la potenciale gravaj movadoj en ĉi tiu jarcento.

Mi ne volas aserti ke ĉiu laboro por Esperanto estas stultaĵo, sed la fakto ke neniu dediĉas eĉ duonan horon de sia libera tempo por aktualigi la mesaĝon de la Esperanto-movado kaj transdoni ĝin al la mondo laŭ la plej bonaj tradicioj de niaj antaŭuloj, de Zamenhof mem ĝis Lapenna, tio ja estas zorgodona.

Speco de timo antaŭ la mondo kaptis nin. Ni hontas ĉar ni scias ke oni primokas nin. Ni ne kuraĝas akcepti la efektivan situacion, ni ne kuraĝas agnoski ke la angla lingvo disvastiĝas multe pli ol ni ŝatus kaj ni regardas spritaĵojn pri la mal-sameco de la angla en Usono kaj Britio, kiel se tiuj kelkaj nuancoj povus helpi nin.

Ni eĉ aŭdacis produkti koheran idearon (nomu ĝin ideologio, se vi ŝatas grandajn vortojn), kiu pravigas ĉion ĉi kaj trankviligas niajn konsciencojn.

Sed nun en la mondo liberigis diablaj malamoj sovaĝaj inter la gentoj. Post la falo de la "muroj de miljaroj", kiuj ŝajnis jam plenumi trankviligan funkcion, oni tre trankvile komencis interbuĉi sin surbaze de naciaj egoismoj.



"Silent' ankoraŭ, sed jam ŝtormo spiras..." (Miklós Radnóti)

Antaŭ ĉi tiu tuta spektaklo la Esperanto-movado silentas. Efektive ĉi tiu nuna haoso liveras al ni tre oportunan okazon, ĉar el ĝi naskiĝos la nova monda organizo-formo. Do la entuta malĉeesto de voĉo esperantista, kiu laŭte asertas nian internan ideon pri frateco inter la popoloj, pri regiona, ŝtata, kontinenta, monda federismo, igas la situacion de nia movado fine de ĉi tiu periodo multe pli malbona ol tiu, kiu ekzistis komence de ĝi. Ekzemple, konantoj de la nuna situacio de la Esperanto-organizaĵoj en eksocialismaj landoj scias pri kio mi parolas. Ankaŭ se,

pro ideologia eraro, la situacio de tiuj organizaĵoj estis pli favora por Esperanto antaŭe.

Se ni silentas antaŭ intergentaj militoj, ĉu ni ne perŝidas la plej bonajn tradiciojn de nia movado? Ĉu vi memoras la alvokon al la diplomatoj de Zamenhof aŭ la leteron al Stalin de Lapenna (por citi nur du ekzemplojn)?

La demando estas: ĉu Esperanto estas politika problemo aŭ ne? Tre ofte esperantistoj, iĝinte esperantistoj, ŝajnas forgesi ke Esperanto por la ekstera mondo estas revolucio rilate al ties politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj organizo-formoj.

Pro tio necesas ke nova politika aganto, nova demokratia transnacia partio formiĝu kaj firmiĝu. Pro tio ni agas nun, kune kun tre konsciaj esperantistoj, en la kadro de la Radikala Partio, kiu celas prezentigi samtempe en kiel eble plej multaj leĝofarejoj de la mondo "esperantismajn" leĝproponojn. Mi esperas ke la movado debatas jam nun pri ĉi tiuj ideoj, kaj ke en la venonta Universala Kongreso de Esperanto en Vieno ni havos okazon interdebati pri la farenadaĵoj.

Renato Corsetti (Italio)

Por la defendo de etnaj lingvoj kaj kulturoj

“Esperanto utilas por protekti la rajtojn de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu nenian specifan lingvon – naciaj lingvoj estas respektendaj, sendepende de grandeco. Esperantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj.” (Proklamo de Voss, 1991)

Post la nova “printempo de nacioj” en 1989-1990, en la nuna tempo de fortaj etnaj konsciigoj, estis neeviteble ke ankaŭ esperantistoj redifinu sian starpunkton pri etna egaleco. La mito pri la dezirindeco de “nacia ŝtato” kiel plej evoluinta politika ento, ideo ekestinta sub la specialaj kondiĉoj de la franca revolucio en 1789, jam longe influis la komunan konscion de la parolantoj de Esperanto, ja nomata “internacia” lingvo, kaj ne “intergenta” aŭ “interetna”. (Tamen, Zamenhof mem preferis paroli pri “gentoj”, vorto samsignifa laŭ PIV al “etno”).

Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), faka asocio kunlaboranta kun UEA, povas kontenti ke ĝiaj principoj trovas ĉiam pli atentan prikonsideron inter esperantistoj. Lastatempe la 62-a Itala

Kongreso de Esperanto (23-26 aŭgusto) konstatis, en sia rezolucio, “la aspiron de la popoloj eviti ĉiun ajn lingvan superecon de iuj etnoj super la aliaj”, konsiderinte la laborrezultojn de Ronda Tablo “Esperanto por la defendo de etnaj lingvoj kaj kulturoj”, kiun aŭspiciis la Torina Universitato. La deklaracio de tiu kunveno, kunvokita de 15 universitataj profesoroj (inter kiuj Giordano Formizzi, Helmar Frank, Pierre Janton, Carlo Minnaja, Fabrizio Pennacchietti, Humphrey Tonkin kaj John Wells), atentigas ke

– la trudo de majoritataj lingvoj super minoritatajn ofendas la dignon de ĉi-lastaj kaj kontraŭdiras, krom aliaj internaciaj traktatoj, la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj;

– etnaj lingvoj de malplimulto troviĝas simile sub la premo de majoritataj lingvoj kiel tiuj estas minacataj de la angla en la funkcio de eŭropa aŭ monda komunikada lingvo;

– sekve, por establi justan lingvan ordon, ĉiu lingvo (kaj kulturo) devas suvereni en sia propra sfero: je loka nivelo regu la lokaj lingvoj; je nacia nivelo regu la naciaj lingvoj; je internacia nivelo oni uzu supernacian lingvon.

Por ĉi-lasta rolo, evidente, proponiĝas Esperanto, kiu krome favoras la komunikadon *rekte inter-etnan*.

Tian lingvan ekvilibron povas garantii, laŭ la Deklaracio, nur “tuja starigo de Eŭropa Federacia Ŝtato”. Tia politika konkludo povas ŝajni aŭdaca aŭ nerealisma. Tamen, pli por-tuja propono de la kunvenintoj estas ke minoritataj, “ankaŭ se eventuale sen nacia civitaneco”, rajtu partopreni en la voĉdonoj por elekti lokajn konsilianojn.

ie

Esperanto sur la parlamentaj tagordoj

Italio: Alberto Menabene, sekretario de Verdula Esperanto-Asocio (VEA), konvinkis la verdulan deputiton Gianni Lanzinger prezentu parlamentan demandon al la ministro pri instruado, “ĉu tiu ne juĝas necesa alpreni iniciatojn por debati la lingvan problemon de la EK, kun aparta atento al la eblo elekti kaj uzi Esperanton”. Unuafoje tia demando estas prezentita en Italio. Lanzinger ankaŭ deponos poresperantan leĝproponon, pretigitan de VEA, ĉe la Ĉambro de Deputitoj.

Portugalo: La 13-an de decembro 1991, la estraro de Portugala Esperanto-Asocio transdonis al reprezentanto de la parlamentestro peticion kun 2497 subskriboj pri la enkonduko de Esperanto kiel elektable kurs-objekto en la mezlerneja sistemo. Deputito José Reis Lamego trapasigos la peticion de komitata ekzameno al plenkunsenda prezento.

Svedio: Dank’ al la agemo de la Esperanto-grupo en Gottenburgo, la social-demokrata deputito Torgny Larsson prezentos proponon en la parlamento pri supra-grada edukado de Esperanto-instruistoj. Larsson opinias ke rapida kresko de la uzo de Esperanto estas utopio, sed ke ĝi jam havas gravan signifon en la nuno.

© 1991 by Alberto Menabene

Verduloj inter la verduloj



En la 6-a Internacia Kongreso de Verdulaj Partioj, kiu okazis la 1-an kaj 2-an de junio 1991 en la svisa Zuriko (*Esperanto*, junio ’91), fondiĝis Verdula Esperanto-Asocio. La fondantaj membroj – grupo de italoj kaj kelkaj membroj de la franca partio “La Verduloj” – volas pli bone kunordigi la verdismajn agadojn de unuopaj esperantistoj. Ili celas premi por atingi la oficialigon de Esperanto kiel laborlingvo de la internaciaj verduloj, eventuale procedante per du- aŭ plurpartiaj interkonsentoj inter tiuj, kiuj sin deklaras favoraj. Perspektive, ili alstrebas la samon en internaciaj kaj ŝtataj rilatoj.

La provizora sekretario (laŭtigante verdan voĉon en la supra foteto) estas: D-ro Alberto Menabene, Via Monti Sibillini 3, I-00141 Roma, Italio.

Ĉu interpopola aŭ inter-esperantista kompreniĝo?

En oktobro 1991, en la germana urbo Hoyerswerda, germanaj loĝantoj, kvazaŭ spektantoj, senfare ĉeestis agresojn al ali-devenaj samurboj, kiuj fine devis fuĝi. Similstilaj teruraĵoj ne mankis en aliaj lokoj.

Tre malversajne inter la diverslokaj agresantoj estis esperantistoj. Pli malklaras, ĉu esperantistoj apogis kaj apogas la aktualan ksenofobion en Germanio. Tiom pri la aktivaj agoj. Mi certas ke ne mankas pasivaj agoj: la ksenofobiaj nefaroj. Temas pri la nefaro protesti kontraŭ perfidaj antaŭjuĝoj en la publiko. Temas pri la nefaro protekti senkulpan atakiton en publikaj transportiloj. Temas pri konkludado: tiu kiu atakiĝas certe ion misfaris kaj meritas la agreson. La atakito ne estas ekzakte kiaj ni kaj se li centprocente adaptiĝus li vivus trankvile.

Ĉu Ideo nur Interna?

Nun rigardo al la esperantista realo: Esperantistoj estas homoj kiuj uzas la internacian lingvon Esperanto en rilatoj kun alilandanoj. Ili faras tion ĉar Esperanto estas facila kaj neŭtrala lingvo. Kiucele ili komu-

nikas? Esperantistoj celas plifortigi interpopolan kompreniĝon, solidarecon kaj pacon. Nu, ŝajne tion esperantistoj jam faras dum pli ol cent jaroj. Sed ili kutimas limigi tiujn noblajn celojn al rilatoj kun aliaj



Ĉiutaga kontakto – ĉu fonto de kompreno aŭ de malsato?

Alvoko al la civitanoj de Eŭropo por tuteŭropa interkonsento pri la lingva problemo

Antaŭvide de la venonta dato de 1992/93, la apogantoj de la nuna alvoko opinias, ke pri la demando de lingvo en la unuiĝonta Eŭropo urĝas alpreni firman iniciaton kaj doni klaran indikon, konforme al la konvinko, ke la problemoj pri lingvo estas unu el la plej delikataj, kaj oni devas alfronti ĝin evitante helpi konkuradon inter ne-egaluloj.

Oni povas aserti kun certa – kaj lastatempaj eventoj tion konfirmas – ke estas en la popolo neforigebla volo konservi sian propran historian kaj kulturan identecon. Interpretante tiun volon, la aliĝantoj al la alvoko sin devigas plenumi kaj apogi kulturan kaj politikan agadon, kiu celas krei “movadon por tuteŭropa interkonsento pri la lingva problemoj”.

Ĝi devos lukti en la taŭgaj lokoj kaj formoj por tiu solvo, kiu aperas kiel la sola demokrate akceptebla en la unuiĝinta Eŭropo: por lingvo konvencia kaj neŭtrala, elektita kun la rekta celo ebligi komunikadon inter ĉiuj personoj, apartenantaj al malsamaj popoloj, en kondiĉoj de egaleco kaj sen privilegioj por iu ajn.

Esperanto-Komitato de la Toskana Regiono
la 25-an de januaro 1992, Pizo

Aprobantoj informu al: S-ro Contardo Telaretti, Via Richa, 56, I-50134 Firenze, Italio.

Esperanto kiel politika (mis)argumento

En la politika pejzaĝo de Francio longe mankis grava verdula partio. Nuntempe troviĝas eĉ du: “Verduloj” de Antoine Waechter kaj “Generacio Ekologia” de Brice Lalonde (cetero, ministro pri medio-protektado). La du ĉefoj akre intermilitas, ĉiu por pravigi la ekziston de sia partio. Komence de marto, Lalonde plurfoje riproĉis publike Waechter pro aro da aferoj: pro ties sinteno pri la Gola milito, ties laŭdira subtenado de korsikaj teroristoj, kaj ... ties apogo al Esperanto. Ni supozas ke ĉefe la potenco de lia lasta argumento sukcesos igi Waechter naŭza, danĝera monstro en la okuloj de la franca balotantaro.

ie (laŭ SAT-Amikaro)

Nova koncepto por la 15-a Esperantologia Konferenco

Kadre de la 77-a UK en Vieno okazos la jam tradicia Esperantologia Konferenco.

1. Ĉeftemo: "Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj". La konferenco celas trakti la diversajn aspektojn kaj problemojn de la laŭcela kreo, konservo, prilaborado, utiligado kaj interkontaktado de la bibliotekoj kaj arkivoj ("muzeoj") dissemitaj tra la mondo.

2. La temo estu traktata per 40-60-minuta prelego.

3. La prelegon sekvu kelkaj eble 2-horaj seminarioj, kiuj traktu aparte gravajn aspektojn de la ĉeftemo kaj ebligu vastan diskuton (kiu ne okazos post la ĉefprelego). Tiuj seminarioj subtemoj povus esti:

- katalogoj; kiel pli efike registri kaj prezenti la trezorojn?
- interbiblioteka kunlaborado
- Esperanto-bibliotekoj kaj la neesperantista fakularo
- prilaborataj projektoj kaj planoj; praktika spert-interŝanĝo kaj reciproka informado.

4. Estas antaŭvidita ekspozicio de kiom eble plej multaj katalogoj, bibliografioj kaj aliaj registritiloj.

Mi do alvokas ĉiujn interesitojn:

a) komenti la prezentitan koncepton de la konferenco, proponi modifojn aŭ aliajn sugestojn;

b) proponi sin mem aŭ aliajn kolegojn por la ĉefprelego, por la gvidado de la seminarioj, por enkondukaj seminarioj prelegetoj (10-15-minutaj);

c) proponi helpojn kaj materialojn por la antaŭvidita ekspozicio.

La prelego-proponojn akompanu resumo kaj kelkaj indikoj pri la prelegojnto. Ĉiuj proponoj atingu la kunordiganton ĝis la 31-a de majo 1992.

D-ro Detlev Blanke

Otto-Nagel-Str. 110, D-O-1141-Berlin

Helpu aligi junulojn al IJK

La preparoj bone progresas por la 48-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos en Montrealo, Kanado, de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto, kun la temo "Liber-tempado". Restas tamen la problemo de aliĝoj. Ni ja ricevis multajn (la nombro superas 120), sed nur 46 aliĝintoj povis jam pagi. La aliaj venus el nepagipovaj landoj: Nepalo, Ĉinio, Haitio, Angolo kaj multe pli.

TEJO jam akceptis dividi la kostojn kun ni por angolano kaj haitiano. Ni nun petas la helpojn de kluboj kaj individuoj. Se vi ĝiras donacan sumon al la kongresa poŝtĉekkonto ĉe FLEJA 000-0035520-18 kun mencio 48-a IJK (Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio) aŭ sendas internacian ĉekon rekte al nia adreso (IJK, 6358 rue Bordeaux, Montréal, Québec, H2G 2R8), vi helpas nin aligi pli da junuloj el pli da landoj.

Post la kongreso ni prezentos al la legantoj de *Esperanto*, la rezultojn de nia alvoko.

Normand Fleury

Prezidanto de la Kongresa Komitato

Kongresa komunikado 2

77-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Vieno (Aŭstrio)

25 julio - 1 aŭgusto 1992

Konstanta adreso:

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederland

La Alta Protektanto:

La honoron de alta protektanto akceptis s-ro Heinz Fischer, prezidanto de la Federacia Parlamento de Aŭstrio. La altrungulo sentas sin proksima al Esperanto nelaste pro tio, ke lia patro estis esperantisto.

Aliĝoj: Ĝis la 1-a de aprilo aliĝis ĉ. 2200 personoj el 65 landoj. Tio aŭguras kongreson kun ĉ. 3000 partoprenantoj. La plej multaj aliĝintoj venas el Germanio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Francio, Italio kaj Japanio.

Dua Bulteno: Fine de februaro aperis alloga kaj informriĉa *Dua Bulteno*. Ĝi donas la plej gravajn informojn pri Aŭstrio kaj Vieno, kaj pri la kongresa programo. Aparte riĉa kaj finance interesa estas la oferto de diversaj loĝeblecoj kaj ekskursoj, inkluzive de tri interesaj kaj variaj postkongresoj. Estas rezervita sufiĉa kvanto da ĉambroj en ĉiuj kategorioj, inkluzive de la plej malmultekostaj. Tamen ne hezitu tuj mendi, ĉar la limdato por mendoj estas la 1-a de majo 1992.

Loĝado: Krom la hoteloj ofertitaj en la Dua Bulteno eblos mendi ankaŭ lokojn en tri aliaj hoteloj: *Clima kaj Trend* (Kategorio 7) kaj *Hotelo Wandl* (Kategorio 5). Hotelo *Trend* situas en la kvartalo de la kongresejo, dum *Clima* kaj *Wandl* situas pli proksime al la urbocentro.

Loĝpetoj en Vieno: Loka Asista Komitato (LAK) en Vieno ne plenumas la ordinarnajn taskojn de kutima LKK. Pro tio bv. ne skribi al la adreso de LAK pri kio ajn lige al la kongreso. Ĉiujn korespondadojn direktu al la konstanta adreso en Roterdamo. Certe ne havas sencjon skribi al LAK pri loĝigo aŭ invitleteroj.

Invitleteroj: La Kongresa Fako ree emfazas ke la oficialajn invitleterojn oni sendos nur al personoj kiuj aliĝis al la kongreso. Financan garantion pri loĝado UEA donas nur por personoj kiuj mendis kaj pagis la loĝadon pere de UEA. Nek UEA nek LAK povas aranĝi privatajn invitleterojn el Aŭstrio.

Oficiala Antaŭkongreso en Prago: Aparta interesiĝo regas por la antaŭkongreso en Prago, kiu sendube estos unu el la plej allogaj antaŭkongresoj ĝis nun. La alta protektanto de la arango estas la ĉeĥoslovacia ministro pri kulturo. La A-kategoria prezo (1290 gld. por loko en dulta ĉambro) estas bazita je plena pensio (t.e. ses



tranoktoj kun tri manĝoj tage) kaj inkluzivas traurbajn kaj eksterurbajn ekskursojn, urban trafikbileton, plurajn kulturajn kaj distrajn aranĝojn, eĉ kelkajn surprizojn. La B-kategorio (por junuloj sub 26 jaroj kaj por aliĝantoj el nepagipovaj landoj) ofertas nur iom malpli por multe malpli alta prezo (inter 120 kaj 190 DEM). Informojn sole por tiu ĉi kategorio petu ĉe CEA, Antaŭkongreso '92, Jišká 10, CS-110 00 Praha 1.

La arango estos vere movad-etosa, organizita de esperantistoj por esperantistoj. Restas ankoraŭ sufiĉe da lokoj en ambaŭ prez-kategorioj.

Jubileo de Komenio: La jubileo 400-jara de la naskiĝo de Komenio (Jan Amos Komenský), pioniro de la ideo pri internacia lingvo, estos diversmaniere omagita ankaŭ de esperantistoj. Speciala kongresa ekskurso – unu el la plej allogaj tuttagaj – celos lian naskiĝlokon Strážnice. Ĝi inkluzivos viziton al filatela ekspozicio pri Komenio kaj plurajn aliajn interesajn programojn. La ekskurson organizos ĉeĥaj esperantistoj de tiu regiono.

Dum la Oficiala Antaŭkongreso en Prago, okazos tuttaga kolokvo pri Komenio, kaj oni vizitos Strážnice, survoje al Vieno.

Dumkongresaj ekskursoj: La Dua Bulteno ofertas kaj detale priskribas kvin tuttagajn ekskursojn, el kiuj kvar okazos en Aŭstrio. Ili celos freŝajn somerajn pejzaĝojn de la aŭstraj alpoj, ebenan kaj vin-faman Burgenlandon, pitoreskan Stirion kun ties eleganta ĉefurbo Graz, kaj la historian kernon de Aŭstrio, la Wachau-valon, situantan laŭlonge de la plej belaj partoj de Danubo. La kvina ekskurso gvidos vin al Strážnice, en Suda Moravio, naskiĝloko de Komenio.

La duontagaj ekskursoj, busaj kaj promenaj, celas konatiĝon kun Vieno kaj la ĉirkaŭaĵo. Ili gvidos al ĉiuj iom pli gravaj lokoj el la historio de Vieno, kaj malkovrigos ties sciencon (ekz. "medicina Vieno") aŭ artan signifon ("Jugendstil" aŭ "art nouveau"). Okazos vizito al la neforgeseblaj "vienaj arbaroj".

Postkongresoj: La tri planitaj postkongresoj serioze interkonkurencas pro siaj allogaĵoj. Unu el ili estas fakte rondiro tra la tuta aŭstra lando, aŭ pli precize tra ties alpoj regionoj. Dum kvin tagoj oni vizitos Graz, Klagenfurt, Innsbruck, Salzburg kaj la ĉirkaŭajn alpin vidindaĵojn. La alia postkongreso estas internacia rondiro laŭ la cirko de la perlarj urboj Venecio-Verono-Bolzano-Innsbruck-Salzburg-Vieno. La tria postkongreso esploras la regionon norde de Vieno. Unue ĝi celos Pragon kaj poste Bratislava, survoje al Budapeŝto. Reveno al Vieno estos tra Eisenstadt, ĉefurbo de la bela Burgenlando.

Helpantoj: La Kongresa Fako de UEA serĉas kapablajn (prefere junajn) helpantojn kun bona kono de la germana lingvo, por interpretado dum la kongresaj ekskursoj kaj aliaj taskoj. Interesitoj bv. anonci sin al la konstanta adreso.

Arta programo: Tiu ĉi promesas esti aparte riĉa kaj varia. Vi povos denove ĝui la teatran arton de bulgaraj aktoroj: BET prezentos dufoje la vigan komedion de Carlo Goldoni "La Gastejstrino". La kamer-teatra trupo "Fokuso" el Sofio sursceniĝos du teatraĵojn originale verkitaĵen en Esperanto, kaj ni povos ĝui ankaŭ la pupistan majstrecon de Tomáš kaj Marianna Plaszky el Slovakio. Tre riĉa estos ankaŭ la muzika programo, kiu konsistos

el diversaj koncertoj de klasika muziko, oper-arioj, kabaretaĵoj, kanzonoj kaj korusoj; ĉio plenumota de profesiaj artistoj.

Afiŝoj de Vieno: elĉerpigis kaj ne plu estas mendeblaj. Ankoraŭ haveblas la Unua Bulteno, ĉu unuekzemplere ĉu en pli grandaj kvantoj.

Internacia Infana Kongreseto: okazos samtempe kun la UK en la ĉarma kaj historia Melk, ĉe Danubo, 80 kilometrojn de Vieno. Akceptata estas infanoj 6-12-jaraj. Pri ĉiuj detaloj kontaktu la UEA-komisionon Christopher Fettes, St Columba's College, Dublin 16, Irlando. Faksno: 353/1-936655. Pagojn sendu al la CO. Kotizoj ĝis la 15-a de majo: 350 gld.; poste 400 gld.

LIBE-kongreso: La 59-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en Vieno, paralele kun la UK, en hotelo Kolpinghaus (Gumpendorferstr. 39). Kotizo de 4500 aŭstraj ŝilingoj (ATS) por la tuta semajno inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj partoprenon en la aranĝoj. Por kongresanoj el iamaj socialismaj kaj triamondaj landoj: 2000 ATS. Informoj ĉe: s-ro Harald Rader, ALBE, Paracelsustr. 13, A-9560 Feldkirchen.

Kotizoj: (en nederlandaj guldenoj, parenteze kotizo por landoj el grupo B): Individua membro de UEA – 270 (135); IM de UEA junulo, handikapulo, kunulo – 180 (90); ne-IM de UEA – 315 (158); ne-IM de UEA junulo, handikapulo, kunulo – 225 (112).

26-a INTERNACIA KONFERENCO DE ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Domo de Konstruistoj, Bratislava, Slovakio
1-7 aŭgusto 1992



KOMENIO – PIONIRO DE LA PEDAGOGIO
Konferenca kadrotemo:
"Methodus linguarum novissima"
(Plej nova metodo de la lingvo-instruado)

Methodus linguarum novissima estas la latina titolo de epokfara verko de la famega ĉeĥ-morava filozofo, teologo kaj pedagogo Jan Amos Komenský, kiu naskiĝis en 1592. Analoge kun la avangardeco de liaj ideoj, kiuj abrupte kontrastis kun la tiutempa eduka-praktiko, ni serĉos kaj diskutos la novajn teoriojn, praktikojn kaj helpilojn, kiuj nuntempe avangardas en la fremdlingva instruado, kaj kiuj povus revoluciigi la instruadon de Esperanto.

Loka Konferenca Komitato: Slovakia Esperanto-Asocio, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio.
Administrado: Bertil Andréasson, Södra rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio.

La membraro de UEA en 1991

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume	LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO DE UEA POR 1990 KAJ 1991
Albanio	0	6	6	Korea Resp.	377	75	452	Kategorio
Algerio	0	4	4	Kostariko	0	3	3	1990
Andoro	0	1	1	Kroatio	0	49	49	1991
Angolo	0	1	1	Kubo	200	49	249	Membro-Gvidlibro
Argentino	47	88	135	Latvio	110	76	186	Membro-Jarlibro
Armenio	0	6	6	Libio	0	1	1	Membro-Abonanto
Aŭstralio	155	87	242	Litovio	88	20	108	Junaj M-Jarlibro
Aŭstrio	99	58	157	Luksemburgio	93	12	105	Junaj M-Abonanto
Azerbajĝano	0	4	4	Madagaskaro	100	4	104	Dumviva Membro
Bangladeŝo	0	2	2	Malto	50	3	53	Junaj Dumviva Membro
Belgio	716	239	955	Maroko	0	2	2	Honora Membro
Benino	0	13	13	Maŭricio	0	1	1	Individuaj membroj
Bjelorusio	0	7	7	Meksikio	60	20	80	7645
Bolivio	0	4	4	Moldavio	0	1	1	8071
Brazilo	211	489	700	Mongolio	0	2	2	Aligitaj membroj
Britio	780	362	1142	Namibio	0	1	1	Junaj Al. membroj
Bulgario	1250	67	1317	Nederlando	284	459	743	6329
Burkina Faso	0	1	1	Nepalo	0	14	14	4026
Burundio	0	3	3	Niĝerio	0	16	16	Membroj entute
Ĉeĥoslovakio	2346	177	2523	Nikaragvo	0	5	5	32869
Ĉilio	24	17	41	Norvegio	351	91	442	27217
Ĉinio P.R.	1090	123	1213	Nov-Zelando	53	58	111	Societo Zamenhof
Ĉinio (Tajvano)	0	27	27	Pakistano	40	18	58	Abonoj Esperanto
Danio	170	105	275	Papua Novgvineo	0	2	2	Kolektivaj ab. Eo
Ebura Bordo	25	3	28	Peruo	25	9	34	Abonoj Kontakto
Egiptio	0	2	2	Pollando	200	369	569	Kolektivaj ab. Kto
Ekvadoro	0	1	1	Portoriko	0	1	1	Patronoj de TEJO
Estonio	90	45	135	Portugaliao	146	32	178	34993
Etiopio	0	1	1	Ruando	0	8	8	28993
Finnlando	580	272	852	Rumanio	0	53	53	La individua membraro de UEA
Francio	498	728	1226	Rusio	117	173	290	atingis en 1991 novan milon kaj novan
Gabono	0	1	1	San Marino	0	5	5	rekordon: 8071, t.e. 426 pli ol en 1990.
Gano	0	6	6	Singapuro	0	13	13	Plej forte kontribuis al la kresko
Germanio (Okc.)	1091	557	1648	Sirio	0	1	1	Pollando (de 110 al 369), Ĉina P.R.
Germanio (Or.)	0	83	83	Slovenio	0	23	23	(de 77 al 123), Tajvano (de 11 al 27),
Greklando	420	34	454	Srilanko	0	5	5	Finnlando (de 238 al 272), Koreio (de
Gujano	0	1	1	Sudafriko	46	14	60	51 al 75), kaj Brazilo (de 466 al 489).
Gvatemalo	0	3	3	Sudano	0	1	1	Aparte ĝojigas la rimarkinda kresko
Haitio	0	11	11	Svedio	981	365	1346	de junaj membroj.
Hinda Unio	0	27	27	Svislando	150	143	293	La aligita membraro plu falis pro la
Hispanio	525	209	734	Tagikio	0	2	2	problemoj de orienteŭropaj asocioj. Ĉi-
Honkongo	0	6	6	Tajlando	0	3	3	foje la novaj realaĵoj batis la asociojn
Hungario	1964	119	2083	Tanzanio	0	6	6	de Bulgario (de 5087 al 1250) kaj
Indonezio	0	4	4	Togo	0	26	26	Hungario (de 3295 al 1964), dum la
Irano	0	80	80	Tunizio	0	3	3	ĉeĥa povis pagi por 1074 membroj
Irlando	50	15	65	Turkio	0	5	5	anstataŭ 210. Definitive malaperis
Islando	50	42	92	Ukrainio	147	35	182	GDR kun 500 membroj; la unueca
Israelo	280	81	361	Urugvajio	0	2	2	germana asocio tamen ne liveris pli
Italio	1160	304	1464	Usono	556	545	1101	grandan nombron ol en 1990.
Japanio	1020	380	1400	Uzbekio	0	3	3	La nombro de landoj kreskis de 97
Jugoslavio	100	96	196	Venezuelo	4	21	25	al 114, ĉefe pro la dispartigo de
Kamerunio	0	9	9	Vjetnamio	0	17	17	Sovetunio kaj Jugoslavio. La okcidenta
Kamboĝo	0	2	2	Zairio	57	21	78	kaj orienta partoj de Germanio aperas
Kanado	70	93	163	Zimbabvo	0	2	2	apartaj pro malsamaj kotizoj.
Kartvelio	0	2	2					La granda kresko de la individua
Kazahio	0	2	2					membraro ŝuldiĝas al diligentaj
Kenjo	0	1	1					perantoj, kaj al multaj membroj kiuj
Kolombio	110	52	162					rimarkis ke plej efike oni varbas en la
Kongo	0	3	3					propra klubo aŭ kurso, kaj inter ge-
				114 landoj	19146	8071	27217	amikoj, eĉ en sia familio. Ni daŭrigu
								tiel ankaŭ ĉi-jare!

Seminario semis, ĉu regionoj rikoltos?

Dudek personoj el deko da eŭropaj landoj: tian partoprenon antaŭvidis la organizantoj Mark Fettes kaj Ivo Durwael por la Seminario de UEA pri Informado, kiu okazis de la 29-a de februaro ĝis la 2-a de marto ĉe la Esperanto-Centro de Poprad (Slovakio). Alvenis tamen 47 personoj el 18 landoj, de Norvegio kaj Albanio ĝis Estonio kaj Belgio. Ja ne nur la landoj de Eŭropo plimultiĝis intertempe, sed ankaŭ la nombro de aktivuloj kiuj pretis kaj povis ĝisveni Slovakion por ideo-sprona, laboriga semajnfino.

La lastatempa viglilo de la Informa Fakto de UEA estis daŭre spurebla en nia revuo. Kreiĝis densa reto de kontaktoj inter agemuloj, riĉiĝis la interfluo de aktivulaj ideoj. Tiu kresko de kunagado estis kulminonta en Poprad – kie, surprize, mankis latinidaj landoj (krom Italio) kaj Britio, sed – eĉ pli surprize – aperis ankaŭ spertaj “nekonatoj”. Pl. ol tridek el la partoprenantoj ja ne kutimas ĉeesti UK-ojn, kaj plimulto ĝis nun ne kunlaboris kun la Informa Fakto.

La celo da la seminario estis duobla: debati pri nia informada strategio, kaj dividi spertojn de la praktika agado. Stefan Maul (Germanio) unue prelegis pri rilatoj kun la gazetaro. Laŭ li, pro la ĝenerala manko de intereso pri Esperanto, ni maksimume povas vekti la scivolon de “latentaj simpatiantoj”. *Konstanta* informado necesas por vivteni almenaŭ ilian intereson. Gravas koni la kutimojn kaj regulojn de profesia ĵurnalismo, kaj indas flegi personajn kontaktojn kun ĵurnalistoj.

Seke, Rainer Heckhausen (Germanio) formulis la demandojn: Kiujn celojn ni alstrebu? Al kiu celgrupo ni transdonu kiun mesaĝon? Li enkondukis novajn nociojn en la diskuton: *socia kampanjo* celas rezultigi ŝanĝon en la socio per akceptigo de certa ideo (Esperanto) ĉe taŭge elektita *celgrupo* (homoj emaj al esperantistiĝo). Por tio necesas adopti la metodojn, laŭcelajn, de *socia merkato*. (Ĉi-tema artikolo

de Heckhausen aperos en baldaŭa numero de *Esperanto*.)

Prezentante la gazetaran servon kiu funkcias en Berlino, ankaŭ Lu Wunsch-Rolshoven opiniis ke ne ĉiuj bezonas Esperanton. Ni prezentu ĝin kiel ilon por pli personaj translimaj kontaktoj, al tiuj homoj kiuj aspiras tiajn. Valerio Dalla (Italio) emfazis ke “ni vendu nian varon nur al tiuj kies produkto similas” (verduĵoj, pacmovadoj ks.). Hans ten Hagen (Nederlando) objektis ke demonstri la praktikajn utilojn de Esperanto (ekzemple en ĝemel-urbaj kontaktoj) povas interesi ankaŭ indiferentulojn. Pluraj samopiniis: nia laboro celu ne nur iun aŭ alian eliton. La seminario

kaj Rumanio Esperanto entuziasme elanas post antaŭa subpremo, sed la ekonomia mizero efikas bremse; en eksaj Sovetio kaj Jugoslavio la identeco de novŝtatoj postulas novan imagon, kiu povus utiligi Esperanton; fine, Bulgario ŝajnas situi inter la du unuaj kategorioj. Evidente, ĉiu el tiuj landgrupoj bezonas apartan specon de informada agado.

Alia laborgrupo de MacGill traktis tre praktikan problemaron: kiel pretigu sin la esperantistoj de la fikcia model-lando Mezeŭropo por okazigi internacian kongreson al-ekstere sukcesan. Sprito kaj amuzo ne mankis, dum ni aplikis nian fantazion al la tre specifaj cirkonstancoj de Mezeŭropo, lando kun areo de “26 milionoj da tablotukoj”.

Post prelego de Durwael pri la psikologiaj aspektoj de informado, la seminario finiĝis per la pritaksoj



Regionaj problemoj serĉas regionajn solvojn.

do ne venis al klara konkludo eĉ pri la celgrupoj de informada agado. Tamen, laborgrupo de Ivo Durwael (Belgio) listigis eblajn kriteriojn por difini ilin. Alia grupo lia “cerbomelkis” ideojn pri konstanta informada agado, ekde apero en radijaj habil-programoj ĝis luado de reklam-stampaj afrank-maŝinoj.

Dum unu okcident-eŭropano povas uzi la ideojn de alia ŝajne profitige, oriente eble tro grandas la diferencoj por tio. Laborgrupo pri Orienta Eŭropo (Stefan MacGill, Hungario) konstatis frajajn malsimilojn. En Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando necesas batali por konservi la jamajn atingojn post la ĉeso de ŝtata favorado; en Albanio

pri ĝi. Plejparto juĝis ĝin “kontentiga”, sed pluraj preferus pli kohere strukturitan programon aŭ fokusadon al centraj demandoj. Komuna estis la opinio, ke tiun ĉi tut-eŭropan seminario sekvu regionaj kunvenoj pri informado, ĉar similajn solvojn eblas doni nur al similaj problemoj. Paŝe al tio, Preben Bagger anoncis ke Dana E-Asocio ĉi-aŭtune okazigos seminario pri informado, kaj Hans ten Hagen starigos konstantan laborgrupon en Nederlando.

Poprad klare montris ke multo okazas landskale en la informada kampo: ofte trafaj kaj efikaj, sed disaj, sen kunordigo. Ĉu elformiĝos regiona kunlaboro informo?

István Ertl kaj Ivo Durwael

Etera temaro, faktecaj prelegoj: La Unua Rusa Sesio de AIS

Moskva Parto

La Akademio Internacia de Sciencoj San Marino (AIS) ekzistas jam 8 jarojn. Ĝi okazigas sesiojn kun sciencaj prelegoj kaj kursojn kun ekzamenoj en kelkaj landoj, kelkfoje agnoskitajn de la ŝtata registaro. Kiam estis ekplanata la unua rusa sesio de AIS (RAISS), neniŭ – kun la laŭdira escepto de kelkaj astrologoj – povis antaŭvidi ke la disdivido de Sovetunio en apartajn ŝtatojn oficialiĝos dum la sesio mem. La diferenco ne evidentiĝis al la partoprenantoj, kiuj tamen devis barakti kun la neefikeco de antaŭe elformiĝintaj laborkutimoj.

La programo klare dividiĝis en partojn sciencajn kaj kulturajn. Scienca programo estas la celo de Akademio kiel AIS, kaj tiu de la Rusa Sesio estis sufiĉe ampleksa, kun apartaj sekcioj pri lingvo, kulturo kaj ekologio. Dum la lastaj tagoj okazis “ludo”, en kiu reprezentantoj de la tri ĉefterenoj argumentis kaj diskutis unu kun alia.



La celo estis serĉi komunajn interesojn kaj laŭnesecajn kompromisojn en la foje konfliktantaj agadseroj de tiuj fakoj. Aŭdiĝis plendo, ke oni argumentas kiel okcidenteŭropanoj antaŭ dek jaroj. La lerteco de la fakuloj pri tiaj problemoj evidente evoluas en ĉiu monda regiono laŭ propra ritmo. Nur kontaktoj kun aliaj regionoj povas plirapidigi ĝin.

Tiu programo estiĝis pro la organiza laboro de AIS-akademianoj Sergej Kuznecov kaj Lev Medvedev, kies respektivaj fakoj, lingviko kaj terkulturo, estis bone reprezentataj en la aranĝo. Ili kaj aliaj sukcesis allogi la partoprenon de plurdek sciencistoj kaj entute 180 partoprenantoj el Eŭropo kaj ĝistiam Sovetunio. Granda parto de la prelegoj okazis en la rusa, kun plene kompetentaj samtempaj tradukadoj.

La kultura programo estis tre impona, kaj ne lasis multan liberan tempon por ekzemple privataj ekskursoj en la urbo. Pro tio mi persone apenaŭ spertis la tre malfacilan ekonomian situacion. Mi scivolas, ĉu la cirkonstancoj pliboniĝis ĝis okazo de eventuala plia AIS-sesio en Ruslando.

Dan Maxwell (Nederlando)

Sanktpeterburga Parto

Sankt-Peterburgo akceptis la gastojn per mola vetero, kelkaj gradoj super nulo, tiel ke la larĝaj branĉoj de la glaciĝinta Nevo kelkloke jam degelis. Trans la rivero etendiĝis longega spaliro de grandiozaj palacoj, kies paŝtelaj koloroj trafe kontrastis kun la vintra ĉielo. Antaŭvidinte la miregon de la ĵusalvenintoj pro la soleneco de tia arkitekturo, la organizantoj dediĉis la unuan tagon al gvidata vizito al la ĉefaj monumentoj de la Norda Metropolo.

Pro eksterordinara evento, la reoficialigo de la ruselezia kristnaska festo (la 7-an de januaro), la scienca programo fariĝis tempe tre limigita. Ĝi okazis la matenon de lundo la 6-a ĉe la Rusa Geografia Societo kaj merkedron posttagmeze en la Lomonosova Kabineto de la Etnografia Muzeo. La solenan malfermon ĉeestis sanktpeterburgaj aŭtoritatuloj kaj sciencistoj. Reprezentis San-Marinon d-rino Marina Michelotti, la estraron de AIS ĝia vicprezidanto prof. Pennacchietti, kaj la Subtenan Sektoron de AIS ĝia prezidanto prof. Weeser-Krell. La tegmenta temo de la du kunsidoj estis verŝajne iom tro etera kaj ambicia: “Harmonio de la kosmo, naturo kaj homo”. Pluraj el la 15 prelegoj, prezentitaj de kvalifikitaj fakuloj, estis tamen tre konkretaj kaj faktecaj.

La kultura programo inkludis gvidatan viziton al la Muzeo de la Ermitejo, al la Cara Vilaĝo kaj al la ĉefaj temploj de la urbo, koruskoncerton de religia muziko, baleton, kaj vesperon de rusa prezentarto. Aparte sukcesa kaj gajetosa estis la arta programo prezentita, en hotela salono, de ensembloj el membroj de la glora, ĵus centjariginta Esperanto-movado de Sankt-Peterburgo kaj de la proksima urbo Tihvin. La tutan Rusan AIS-Sesion krona fermis bufeda bankedo aranĝita en hotela salono. Toste ĉiuj gratulis la ĉeforganizanton de RAISS d-ron Lev Medvedev, s-ron Belousov, kaj la mirindajn sanktpeterburgajn samideaninojn (inter ili Varvara kaj Valeria Cvetkova, Ludmila Titova kaj Svetlana Ejst), dank' al kies entuziasmo kaj organiza talento realiĝis brila ekstermovada evento en kiu ĉefrolis la internacia lingvo.

Fabrizio Pennacchietti (Italio)

La esperantistoj de Nijegorod (Rusio) jam organizas la duan rusan AIS-sesion, kiu okazos en junio 1993, samtempe kun la Nijegoroda Foiro, sub la slogano “Ekologia renesanco de la rusa rivero Volgo”. Kontaktu Vadim Salov, str. Petriŝĉeva 12-615, Dzerĵinsk, Nijegoroda regiono, 606037 Rusio.



konstante

Bulgara Esperanto-Asocio (BEA), bul. Hr. Botev 97, BG-1303 Sofio; tel. +359/02/88 24 72 aŭ 31 61 80

Esperantotur-direkcio, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; tel. (52) 415 744 kaj 410 005; faks. (52) 415 115; teleks. 562 840 etur pl
Hungara Esperanto-Asocio (HEA), Pl. 193, H-1368 Budapeŝt; tel./fakso +36/1/1560-244

Internacia Kultura kaj Kleriga Centro, E-Centro de SEA, Sobotské náměstie 6, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio; tel. +42-92-32419

Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé, Francio

La Kvinpetalo, route de Civaux, F-86410 Bouresse, Francio; tel. +33-49-428074

Ontaria Esperanto-Asocio, Letterfako 80, Filio B, Ottawa, K1P 6C3 Kanado

tra la jaro

Esperantaj semajnfinoj kaj Esperanto-kursoj, KCE, Svislando (adreso supre)

Diversaj turismaj kaj fakaj aranĝoj, laŭ mendo, Poprad, Slovakio, kaj Bydgoszcz, Pollando (E-Centro de SEA, resp. Esperantotur, adresoj supre)

Busekskursoj kaj turismaj restadoj en Kanado kaj Alasko (Voyages Esperanto Enr., 5232 Grand, Montréal, Québec, CDN-H3X 354)

Internaciaj buso- kaj flugvojaĝoj (E-Vojaĝoservo de Unson, p/a Travel Service Montclair, 6104 La Salle, Oakland, CA 94611; tel. +1/510/33 92 001; faks. +1/510/ 33 96 317; teleks. 234 951 529)

Feriadoj ĉe la Balta maro kun Esperanta kaj turisma programo, Jurmala, Litovio ("Tim-Tur", Mara Timermane, Ku Valdemara 1451-32, Riga)

Konstanta Internacia E-Lernejo kaj diversaj vojaĝoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

aprilo

17-21: 47-a Kongreso de SAT-Amikaro, Artigues-près-Bordeaux, Francio (François Sendrey, 171 rue Salvador Allende, F-33130 Bègles; temo "De Mozart ĝis Eurokka, muziko kaj Esperanto: komplikce de du internaciaj lingvoj")

18-19: **Praktika literatura seminario**, Belogradĉik, Bulgario (Literatura sekcio de BEA, adreso supre)

18-25: **Internacia Renkonto de Infanoj**, Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, adreso supre)

21-26: 10-a TEJO/PSEK Seminario por E-aktivuloj, Zielona Góra, Pollando (Jurek Rządski, Węgielska 32/5, PL-65 001 Zielona Góra, tel. (068) 66825)

21-02: **Lingvopraktikado kaj parolkapableco**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre)

26-03: **Internacia kurso de "eta komerco"**, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre; gvidas William R. Harmon)

30-03: 4-a Alp-Adria Konferenco, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)

30-03: **Junulara E-Renkonto en Szombathely**, Hungario (Virág Stossek, Adytér 31A, H-9700 Szombathely)

30-03: 52-a Hispana Kongreso de Esperanto, Mérida (Fr. Cabezas Jimenez, Ap-do 431, E-06800 Mérida)

30-03: **Kongreso de Franca Katolika E-Asocio**, Francheville, Francio (FKEA, 26 bis rue Milngavie, F-49150 Baugé, tel. +33/41 89 29 47)

majo

01-03: 17-aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

01-03: **SATEB-konferenco**, Barlaston, Anglio (The Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs. ST12 9DG)

01-03: 7-a Junulara Festivalo de E-Poezio kaj Kanzone, Bydgoszcz, Pollando (Zespół Szkół Handlowych, str. Kaliska 10, PL-85-602 Bydgoszcz)

03-10: "Kiel gvidi propran firmaon?", Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre; la kurson gvidas Werner Bormann)

08-10: **Bohuma kafoklaĉo**, semajnfina renkonto de la E-junularo en Bochum, Germanio (Emilia Witter-van de Loo, Laerholzstr. 84 B/205, D-W-4630 Bochum; tel. +49/0234/ 704595)

08-10: 3-aj Bjalistokaj Esperanto-tagoj, Pollando (Tow. Esperantystów, Pk 67, PL-15-950 Białystok)

08-10: **Apudmara Junulara E-renkonto**, Klaipeda, Litovio (Klaipeda E-Klubo, pk. 179, LIT-800 Klaipeda)

08-10: **Internacia Renkonto de Korespondkursanoj**, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)

08-10: **Printempa Esperantista Renkonto**, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)

08-13: **Piedaj Ekskursoj en Piktovio**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre)

15-18: 4-a **Ontaria Esperanto-Kongreso**, Waterloo, Ontario, Kanado (Ontaria E-Asocio, adreso supre)

16: **Internacia Kultura Festo "La blanka Kolombo"**, Sofia, Bulgario (Maja Gorova, str. San Stefano 23-A, BG-1504 Sofia)

16-23: **Intersekcia Studadeso de Akademika Internacia de la Scienco (AIS)**, Krynica, Pollando (Jan Taliuk, ul. Słoneczna 19/57, PL-32-050 Skawina)

21-24: 6-aj **Esperanto-Tagoj de Staszów**, Pollando (E-klubo, Parkowa 6, PL-28-200 Staszów)

22-23: **Kafoklaĉo de la E-junularo en Stuttgart**, Germanio (Falk Viczian, Fasanenhofstr. 98b, D-W-7000 Stuttgart 80; tel. +49/0711/7156925; kun vizito al la radio-stacio *Süddeutsche Rundfunk*)

22-24: **Tutlanda Renkonto**, Budapest, Hungario (Hungaria E-Asocio, adreso supre)

22-24: **Sveda Esperanto-Kongreso**, Oskarshamn, Svedio (Harold Brown/Kerstin Rohdin, Box 142, S-57900 Högsby; temo "Esperanto kiel perilo de kulturaj valoroj")

24-31: "La Esperanto-gazetaro", Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre; la seminarion gvidas Ada Fighiera-Sikorska)

27-31: **Tagoj de Kievo**, Ukrainio (Centro "Esperanto", P.O. Kesto 539/1, 254200 Kiev)

1-a Borso de Manuskriptoj en Esperanto

kaj

Konferenco de Esperanto-Tradukistoj

Hotelo "Rimski vrecel" (B-kategorio) en Kotlje ĉe RAVNE na Koroškem, Slovenio (75 km de Klagenfurt, 80 km de Maribor)

30-31 majo 1992

kun aparta kultura kaj ekskursiva programo

Se vi havas ian ajn manuskripton de **tradukita verko** en Esperanto aŭ el **ĝi aŭ originale skribitan** en Esperanto aŭ en via nacia lingvo kun la deziro ke ĝi estu tradukita en Esperanto, **venu al la borso!**

Adreso:

Interkulturo
Koževarjeva 12
SLO-62000 Maribor, Slovenio

INTER KULTURO

- 28-31: Ĉielir-taĝa renkontiĝo, Eindhoven, Nederlando (Jeannette Bosse, P. Dondersstr. 23, NL-5613 LP Eindhoven)
- 28-31: 26-a Internacia Boatado, Nacia Parko "Aŭkŝtariĵa", Litovio (JEK "Juneco", p.k. 61, Vilnius 2000)
- 28-31: Kurso "Pri beletro", Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; instruas Giorgio Silfer)
- 28-01: 12-a Internacia Renkontiĝo de Popolorkestroj, Toruń, Pollando (Etnografia Muzeo, str. Waly Gen. Sikorskiego 19, PL-87-100 Toruń)
- 30-31: 12-a Internacia Esperantista Deklamkonkurso, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)

junio

- 01-07: 14-a Ĉebalta Esperantista Printempo, Mielno, Pollando (Pola E-Asocio, Filio en Koszalin, Pk. 30, PL-75-016 Koszalin)



KISO

22-28 junio, Germanio

- 05-08: Pentekosta tendumado de la Brandenburga E-junularo en Schwerin, Germanio (Esperanto-Jugend Brandenburg, Berliner Str. 49, D-O-1560 Potsdam)
- 05-08: Boatado en belega pejzaĝo ĉe Sankt-Peterburgo, Rusio (Svetlana Ejst, Partizana Germana str. 15-1-98, RUS-198329 Sankt-Peterburgo)
- 05-08: 70-a Germana Esperanto-Kongreso, Schwerin, Germanio (Ursula Felhölter, Lathener Str. 4, D-W-4500 Osnabrück; tel. (0541) 43 38 25)
- 05-10: Eŭropa Kongreso de Esperanto, Verona, Italio (Organiza Komitato, Vicolo Ghiacciaia 3, I-37122 Verona; tel. 045-500481; temo: "La interkomunikado en Eŭropo")
- 06-07: Esperantista Renkonto "Abritus", Razgrad, Bulgario (E-kulturdomo, str. G. Dimitrov EK-3, BG-7200 Razgrad; kun literatura konkurso por originala poezio kaj humuraĵoj)
- 06-07: Esperantista Renkonto "Ro-92", Kazanlak, Bulgario (E-societo, Pk. 65, BG-6100 Kazanlak)
- 06-08: Migrado en Juraso, KCE, Svislando (adreso supre; kun Claude Gacon kaj Alan Favre)
- 07: Dua Esperantista Renvido, Vila-rodona (Tarragona), Hispanio (José M. Galofré Domingo, C. Canonge Joncar, 122 D, E-08208 Sabadell)

- 10-20: "Turismo, Kulturo, Historio", Velingrad, Bulgario (E-Societo, pk.7, BG-4600 Velingrad)
- 12-14: Printempa Semajnfina Renkontiĝo, Perth, Ontario, Kanado (Ontaria E-Asocio, adreso supre)
- 13-14: 40-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, Oosaka, Japanio (KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Oosaka-hu, 561)
- 20-10: 5-a Internacia Muzika Seminario, Stara Zagora, Bulgario (MEL, Milin Kamak 58, BG-1421 Sofja; instruos Dimitar Terziev)
- 20-25: 25-a Pupteatra Internacia Festivalo, Zagrebo, Kroatio (IKS, CRO-41000 Zagreb, p.p. 499, tel. +38/041/435-205, faks.+38/041/421-294)
- 22-28: 7-a KISO (Kafokola Internacia Somera Renkontiĝo), Marburg, Germanio (Marburga Esperanto-Grupo, Kaffweg 9b, D-W-3550 Marburg/Lahn 1; urĝkaze tel. +49/06421/27889; temo "Ludi, krei, sperti sin mem")
- 22-29: Lingvokurso en tendaro por geknaboj (10-ĝis 14-jaraj), Hungario (HEA, adreso supre)
- 24-09: Internacia Amika Renkonto, Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, adreso supre)
- 25-29: 2-a Internacia Esperanto-Kongreso, Vilnius, Litovio (Rolandas Stamkauskas, str. Stirny 27, Vilnius)
- 26-28: FLEJA-Semajnfino, Eeklo, Belgio (Flandra Esperanta Junulara Asocio; Willems Rassehaert, Zandberg 26, B-9070 Destelbergen-Heusden)



FLEJA-Semajnfino 26-28 junio, Belgio

- 26-01: Internacia Renkontiĝo "Blankaj noktoj", Sankt-Peterburgo, Rusio (Svetlana Ejst, Partizana Germana str. 15-1-98, RUS-198329 Sankt-Peterburgo)
- 27-28: 3-a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio, Callosa del Segura, Hispanio (VEF, Gran Via Fernando el Católico, 45, 3ª, E-46008 Valencia, tel. +34/96/384 96 16)
- 27-02: 11-a Internacia Literatura Forumo, Vraca, Bulgario (Kooperativo de Literatura Foiro, CP 303, CH-1008 Prilly, Svislando; temo "La porinfana E-literaturo")

- 27-??: Ĉirkaŭ-monda Flugo, ĝis-12-monata E-vojaĝo por partopreni gravajn kursaron kaj kongresojn (Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069, Aŭstralio)
- 28-03: 25-a Somera Studsemajno, Jyväskylä, Finnlando (Terittu Tynnelä, Taidepolku 6 J, SF-40720 Jyväskylä)
- 29-16: Internacia E-tendaro por Infanoj, Reinwarzhofen, Germanio (Esperanto-Jugend Brandenburg, Berlinerstr. 49, D-O-1560 Potsdam)



25-a Somera Studsemajno 28 junio-3 julio, Finnlando

- 29-17: Somera Kursaro, San Francisco State University, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010; tel. +1-415-342-1796; instruas R. Jaderstrom, I. Koutny, J. Werdin)
- 30-04: Raymond Schwartz, kiun mi konis: la homo, lia verko, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Georges Langrange)

julio

- en tri etapoj inter 05 jul kaj 15 aŭg: Somera Esperanto-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Esperanto, CS-67401 Trebič)
- 01: Poezio-Observatorio, Belgradĉik, Bulgario (Literatura Sekcio ĉe BEA, adreso supre)
- 02-07: Konatiĝo kun la regiono Poitou, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre)
- 02-12: Sovieta E-ista Junulara Tendaro, apud Sankt-Peterburgo, Rusio (Andrej Lyskov, pk.34, RUS-117071 Moskvo)
- 03-17: Internaciaj kursoj de E-o diversnivelaĵ, Varna, Bulgario (BEA, adreso supre)
- 04-05: 28-a Landa Amika Renkontiĝo, Satoraljaiújely, Hungario (Fervoja ista fakgrupo de HEA, Pk. 220, H-3502 Miskolc)
- 04-17: Somera Esperanto-Lernejo, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 05-19: Internaciaj kursoj, Varna, Bulgario (BEA, adreso supre)

- 06-11: Somera Kurso, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Popola Altlernejo, Fako 192, S-691 24 Karlskoga, tel. +46/0586/503 60)
- 06-11: Ruse kaj koruse, inico al la (eks-)sovetia e-ista kanta tradicio, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Ivan Popov)
- 06-11: Al kiuj estonteco celas Orienta Eŭropo?, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Tomasz Chmielik)
- 09-22: Prelegoj kaj kursoj, Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, adreso supre; temo "Grésillon 40-jara")
- 10-15: Preparado al la 4-a kaj 5-a Ekzamenoj, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre)
- 10-17: Somera E-ista Feria/Familia Tendaro, Thomsdorf bei Feldberg, (Orienta) Germanio (Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13, D-O-2000 Neubrandenburg)
- 11-14: Somera Semajnfino de la Ligo de Samsesemaj Geesperantistoj, Bonneuil, Francio (Peter Danning, G/f, 68 Church Road, Richmond, Surrey, TW10 6LN, Britio)
- 12-17: 28-a Brazilo Kongreso de Esperanto, Anápolis, Brazilo (C. P. 399, 75001 Anápolis (GO); temo: "Uzado de Esperanto")



**4-a Tutmonda Renkontiĝo
por la Interhoma Frateco
22-26 julio, Hispanio**

- 13-18: E-kursoj ĉe Universitato de Hartford, Usono (preferate angle; Mrs. Hilda Grossman, Director of Summer Programs, University of Hartford, West Hartford, CT 06117; tel. +1/203/768-4401 aŭ +1/800/234-4412; ĉiuj niveloj)
- 13-18: Metodologio de instruado, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Claude Gacond)
- 13-18: Erotika literaturo en Esperanto, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Tomasz Chmielik)
- 15-24: 25-a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hungario (HEA-komitato dep. Baranya, Pk. 2, H-7601 Pécs)

- 17-22: Kurso "La apudbelectro", Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; instruas Ed Borsboom)
- 18-19: Esperanto kaj kinarto, KCE, Svislando (adreso supre, gvidas Giorgio Silfer)
- 18-22: 10-a Jubilea Sesio de Internacia Somera Esperanto-Universitato, Sesio de Akademio Internacia de Sciencoj – San Marino, kaj Internaciaj Ekzamenoj de IELE/UEA, Veliko Tarnovo, Bulgario (BEA, adreso supre)
- 18-23: 40-a Jarkongreso de ELNA, Univ. of California, Berkeley, Usono (ELNA, P.O.B. 1129, El Cerrito, CA 94530, tel. +1/510/653-0998; temo: "Kunlabori efike")
- 18-24: Internacia Esperanto-Konferenco, Ateno, Grekio (Eric Laubacher, OSIEK, 53 avenue Henri Barbusse, F-92140 Clamart, Francio; tel. (16 1) 46 45 41 26; temo "Lingvo kaj kulturo")
- 18-24: Seminario "Urboj por vivi", Berlin/Potsdam, Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Unter den Linden 38, D-O-1086 Berlin; tel. +372-203-40564, faks. +372-203-40543)
- 18-25: Kristana Esperanto-Kongreso (KELI + IKUE), Vence, Hungario (Éva Farkas-Tatár, Dohány u. 36 II 2, H-1077 Budapest)
- 18-25: 1-a Mondkongreso de Esperantistoj-Handikapuloj, Františkovy Lázně, Ĉeĥoslovakio (Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, poŝtkesto 63, CS-274 80 Slaný)
- 18-27: 25-a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hungario (Departamenta Komitato de HEA, P.f.2, H-7601 Pécs)
- 18-01: Katolika E-Tendaro de IKUE, Sebranice, Litomýšl, Ĉeĥoslovakio (M. Svaček, Tršická ul. 6, CS-75127 Peňčice)
- 19-25: Antaŭkongreso de la 77-a UK, Prago (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio)
- 20-25: Fasto kaj akordigebla dieto, du el la ĉefaj aspektoj de la natura vivo, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Pierre-Marie Charrière)
- 20-25: Svisa antologio: tradukkurso, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Tomasz Chmielik)
- 22-26: 4-a Tutmonda Renkontiĝo por la Interhoma Frateco, Granado, Hispanio (Co-Planet '92, Pablo Picasso 30, E-18006 Granada; tel./faks. +34/958/819660; por tutplaneda kunlaboro, per laborlingvoj hispana, angla kaj Esperanto)
- 23-02: Skolta Tendaro "Grenzenlos", Bitburg/Eifel, Germanio (Martin Bähr, Ladenbecker Furtweg 256, D-W-2050 Hamburg 80; organizas Esperanto-trupon por Skolta E-Ligo)
- 23-05: Lerno, Praktiko kaj Perfektiĝo/Seminario Cseh-Metodo, Grésillon,

- Francio (Kultura Esperanto-Domo, adreso supre; plus "La arto traduki" kun G. Lagrange dum la unua semajno)
- 25-01: 77-a Universala Kongreso de Esperanto, Vieno, Aŭstrio (77-a UK, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
- 25-01: 60-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Vieno, Aŭstrio (Harald Rader, Paracelsustr. 13, A-9560 Feldkirchen)
- 25-02: Ekspozicio "J. A. Comenius kaj Interlingvistiko en Filatelo", Strážnice, Ĉeĥoslovakio (Esperanto, Pk. 34, CS-696 62 Strážnice; tel. +42-631-942507)
- 27-01: Heredigo de Esperanto en familio, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Blazio Vaha)
- 27-01: Esperanto-feriado por infanoj kaj familioj, KCE, Svislando (adreso supre)
- 27-09: Internaciaj kursoj, Pisanica, Bulgario (BEA, adreso supre)

aŭgusto

- precizigota: EKOTOPIO '92, Bulgario (Dimitar Mutušev, str. Mih. Bubotinov 32, BG-1408 Sofio)
- 01-07: 26-a Internacia Konferenco de IELE, Bratislava, Slovakio (Stefan MacGill, Eső u. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario)
- 01-07: Turisma Semajno en Slovakia Paradizo, Slovakia Paradizo ĉe Spišská Nová Ves (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 01-08: Kristana Junulara E-Renkonto, Nyíregyháza-Sóstó, Hungario (Móviló, Hevesi Gy. út 107 II/8, H-1157 Budapest; tel. +36/1/271-9510; temo: "Religiaj problemoj de nuntempa junularo")



**Internacia Skolta Tendaro
1-10 aŭgusto, Ĉeĥoslovakio**

- 01-08: Ekspurso tra Hungario (HEA, adreso supre)
- 01-10: Internacia Skolta Tendaro, Kremnica, Ĉeĥoslovakio (Arie Bouman, Driesdreef 8, B-9030 Gent, Belgio, tel. +32/091/27 48 41)
- 02-04: 7-a Konferenco de Kolektivo Esperantista Komunista, Leoben, Aŭstrio (Internaciisto, Erzstr. 11, A-8704 Leoben)

- 02-08: Paroliga Semajno, Senica, Ĉeĥoslovakio (Anna Hornáková, ul. Hviezdoslavova 313/19, CS-905 01 Senica)
- 02-08: 14-aj E-Turismaj Tagoj, Vratnava, Ĉeĥoslovakio (E-klubo, pk B-152, CS-01241 Zilina)
- 02-09: 48-a Internacia Junulara Kongreso, Montrealo, Kebekio (Kanado) (LKK de 48-a IJK, 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado H2G 2R8; tel.-respondilo +1/514/722-0151)



6-a Internacia Junulara Semajno
3-9 aŭgusto, Hungario

- 02-09: 2-aj Internaciaj E-kursoj por gejunuloj, Prago, Ĉeĥoslovakio (Vladimír kaj Pavla Dvořáková, Zelenecká 20, CS-194 00 Praha 9; ĉiuj niveloj)
- 03-08: La idealo de Zamenhof, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas François Degoul)
- 03-08: Miaj spertoj pri Orienta Azio, KCE, Svislando (adreso supre; rakontas Spomenka Štírnec)
- 03-09: 6-a Internacia Junulara Semajno, Esztergom, Hungario (LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87)
- 04-09: Eklerno de Esperanto tra ludoj por gejunuloj, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Giorgio Silber kaj Alessandro Beltrami)
- 04-15: 28-a Internacia E-ista Feriado, Kudowa Zdrój, Pollando (Pola E-Asocio P.O.K. 16, PL-50-952 Wrocław; tel. +48/71/22 69 54)
- 05-10: Traduka staĝo por du niveloj, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; trejnas Georges Lagrange kaj Suzanne Bourrot)
- 05-15: 65-a Kongreso de SAT, Kaunas, Litovio (Litova E-Asocio, 233000 Kaunas - C, ab.k.167; tel. +7012/208503; telekso 269806 BOOK SU; fakso +70127/204970)
- 06-19: Lerno, Praktiku kaj Perfektigu/Seminario Cseh-Metoda, Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, adreso supre)
- 08-09: Kongreso de Kanada E-Asocio, Montrealo, Kebekio (Kanado) (KEA, P.O.B.2159, Sidney, BC, Canada V8L 3S6)

- 08-15: Lingvo-tendaro por Infanoj, Doboz-Sanazug, Hungario (Movilo, Hevesi Gy. út 107 II/8, H-1157 Budapest; tel. +36/1/271-9510)
- 08-16: 4-a Internacia Tablotenis-Konkurso E-ista, Hódmezővásárhely, Hungario (HEA Medicina E-Fakgrupo, H-6801 Hódmezővásárhely, pk.89)
- 08-17: Internacia turista marŝo, Pirimontaro, Bulgario (Esperanto-Societo, Petrić)
- 09-16: Mezeŭropa Junulara Semajno, Olomouc, Ĉeĥoslovakio (Studentcentrum, Esperanto, Křižkovského 14, CS-77200 Olomouc, tel. +42/68/208462; temo: "Ĉu komuna lingvo sufiĉas? Mezeŭropo prezentas sin")
- 10-15: Skiza historio de la priskribo de la lingvo Esperanto, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Blazio Vaha)
- 10-15: De Piĉ ĝis Valano: lingvo- kaj stilkonceptoj en la originala literaturo, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas István Ertl)
- 12-16: 10-a Jubilea Sesio de Internacia Somera E-Universitato, Veliko Tarnovo, Bulgario (E-societo, pk. 121, BG-5000 Veliko Tarnovo)
- 13-18: Eŭska montara aventuro, Alsasuo, Eŭskio, Hispanio (Antton Ameyo, Gorbea, 4-2 dcha, E-01008 Vitoria-Gasteiz; tel. 34/945/245671)
- 13-18: Pufparado kaj kudrado, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Marie Hunnink)
- 15-17: 50-a Argentina Esperanto-Kongreso, Mar del Plata, Argentino (Esperanto-klubo, Hernandarias 558, RA-7600 Mar del Plata (BA))
- 15-22: Renkonto de E-istaj Naturprotektantoj, Bakonyország-Sevénykút, Hungario (Movilo, Hevesi Gy. út 107 II/8, H-1157 Budapest, tel. +36/1/271-9510)
- 15-28: Internacia Lernejo por Funkcioj de E-Asocioj kaj -Organizoj, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)



28-a Internacia E-ista Feriado
4-15 aŭgusto, Pollando

- 16-22: 6-a Potsdama Somera Esperantista Tendaro, Germanio (Esperanto-Jugend Land Brandenburg, Berliner Str. 49, D-O-1560 Potsdam)
- 17-22: 5-a Pacifika E-Kongreso, Qingdao, Ĉinio (Pacifika Kongreso, Hotelo Huanghai 75, Yan-an Yi Lu, CN-

- 266003, Qingdao; temo: "Kunlaboro kaj progresio en la pacifika regiono")
- 17-22: Perfekta kurso por instruistoj, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Ilona Koutny)
- 17-22: Enkonduko en sociologio kaj aplikado al la E-movado, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Zbigniew Galor)
- 17-23: Internacia "Ĉe finna golfi", Sankt-Peterburgo, Rusio (Sverlana Ilt, Partizana Germana str. 15-1-98, RUS-198329 Sankt-Peterburgo)
- 17-23: 14-a Somera Studenta E-Renkonto, Gdańsk, Pollando (Adam Cholewiński, u. Kolobrzeska 42 D/76, PL-80-394 Gdańsk, tel. +48/58/564603)
- 19-20: 2-a Junulara Renkontiĝo "Sen juneo ne estos estonto!", Vraca, Bulgario (Esperanto, pk. 66, BG-3000 Vraca)
- 20-25: Kanzonoj kaj skeĉoj, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; trejnas Claire Vennin kaj Lucie Raynal)
- 20-02: "Kiel vigne helpi la instruadon", Grésillon, Francio (Kultura Esperanto-Domo, adreso supre)
- 22-28: Inter-Amik'-1, apud Kievo, Ukrainio (Kieva Centro "Esperanto", P.O.K. 5391, UKR-25420 Kievo)
- 24-28: Seminario "Eŭropa Interkompreniĝo" de la Rein-Vestfalia E-Ligo, Freudenberg, Germanio (Manfred Klag, Görrestr. 51, D-W-4050 Mönchengladbach 5; tel. +49/02161/58 35 86)
- 24-29: Kompreni la modernan pentroarton, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Pascal Dubourg-Glatigny)
- 24-16 okt: Por-komencanta kurso, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Popola Altlernejo, Fako 192, S-691 24, Karlskoga, tel. +46/0586/503 60)
- 28-30: Somera Semajnfina Renkontiĝo en Ontario, Kanado (Ontaria E-Asocio, adreso supre)
- 31-05: Fungoj en Juraso, KCE, Svislando (adreso supre; gvidas Alain Favre)

septembro

- 01-31 majo 1993: Internacia Studumo pri Turismo kaj Komercio, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)
- 03-08: Internacia fungokolekto en rusa arbaro, Vladimir kaj Moskvo, Rusio (Junulara Centro "Intero", str. Dnepropetrovskaia 3-3-139, RUS-113525 Moskvo)
- 04-06: Nederlanda Esperanto-Renkonto, Elspeet, Nederlando (Catrien Bosong, Floraplein 23, 5644 JS Eindhoven; tel. +31/040-114162; aŭ tel. Atie van Zeist +31/010/4361044)
- 04-06: Skota Aŭtuna Kultura E-ista Semajnfino (d-ro A. Goodheir, 16 Woodlands Dr., Coatbridge, ML5 1LE, tel. 44/0236/421636)

- 05: Studotago: Esperanto, mitoj kaj faktoj, Gent, Belgio (Patrick Haerick, Zilverbeklaan 25, B-9032 Gent-Wondelgem)
- 05-06: 43-a Kongreso de Bulgara E-Asocio, Stara Zagora, Bulgario (BEA, adreso supre)
- 05-12: E-Kongreso por la pli aĝa generacio, Augsburg, Germanio (LKK: Esperanto-Press Augsburg, Waterloostr. 21, D-W-8900 Augsburg, tel. +49/0821/79 28 35; private 48 81 49)
- 05-14: Internacia biciklado en Bulgario (D. Ivanov, str. Paisij 3-E-44, BG-7700 Targovište)
- 06-12: Mikologia Seminario, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 11-13: 19-a Kavalira Konkurso, Hungario (HEA Entomologia Rondo E-ista, Romcsék Kálmán, H-1108 Budapest, Oltó u. 10)
- 11-15: 6-a Kongreso de Itala Katolika Unuiĝo E-ista, Susa (Torino), Italio (UECI, Viale C. Zavagli 73, I-47037 Rimini FO)
- 12-19: 17-a Internacia Semajno de Esperanto, Sète, Francio (Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5 rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier; tel. +33/67 54 15 43)
- 12-19: Scienca Universitata Seso de AIS, Tow. Esperantystów, Pk 67, PL-15-950 Białystok)
- 18-20: Konferenco pri "Komenio kaj la Internacia Lingvo", Sárospatak, Hungario (HEA, adreso supre)
- 19-25: Aŭtuna Subtrata Semajno, Almontara turismo, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)



Esperanto-Kongreso por la pli aĝa generacio

5-12 septembro, Germanio

- 25-27: Internaciaj Tagoj de la 80-jara E-klubo "A. Tellini", Bologna, Italio (Mario Amadei, Via Perti 10, I-40134 Bologna)
- 25-30: 18-a Internacia Foiro de E-Turismo, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)
- 26-27: Internacia ekspozicio kaj konkurso de kantoj, Sofio, Bulgario (Turisma

Sekcio ĉe BEA, pk. 45, BG-1000 Sofio)

fine de la monato: Ekster-Provinca Ekskurso, Ontario, Kanado (Ontaria E-Asocio, adreso supre)

oktobro

- 01-04: Vina Seminario en Bzenec, Ĉeĥoslovakio (Jana Burianová, Renneska 35, CS-63900 Brno)
- 01-06: Naĉlingva tradukado de Esperanta literaturo, simpozio de EVA, Poprad, Slovakio (aliĝo ĉe E-Centro de SEA, adreso supre; pri temaj demandoj: D-ro W. Verloren van Themaat, Volkerakstr. 38-1, NL-1078 XT Amsterdam, Nederlando)



2-a Interlanda Konferenco pri Instruado
9-12 oktobro, Argentino

- 03-04: Seminario pri geologio kaj E-staĝo ĉiunivela, Hettange-Grande, Francio (C. Gallego, 49 rue Gén. de Gaulle, F-57330 Hettange-Grande)
- 04-12: Duaj Esperantaj Labortagoj, Torrox, Hispanio (Andaluzia E-Unuiĝo, pk.864, E-29080 Malaga; temo: "La esperantigado de la socio")
- 04-18: Esperanto-Studvojaĝo al Kubo (Weidmann's Mondo-Servo, Bad Störzel, CH-9063 Stein AR, Svislando; tel. +41/071/592025, faks. +41/071/592026)
- 08-11: Montkastela Renkontiĝo de la Aŭstra E-Junularo, Trofaiach bei Leoben, Aŭstrio (AEJ, Axel Leitner, Matznerg. 26/19, A-1140 Wien)
- 09-12: 2-a Interlanda Konferenco pri Instruado, Pcia. Roque Sáenz Peña, Chaco, Argentino (Rubén T. Diaconu, str. Jugoslavija y Esperanto, RA-3700 Pcia. Roque Sáenz Peña)
- 10-23: Aŭtuna Esperanto-Lernejo, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 16-18: Seminario "Kiel uzi Esperantajn vortarojn?" kaj Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, Vracsa, Bulgario (Esperanto, pk. 66, BG-3000 Vracsa)

- 17-18: Festa Nacia Renkontiĝo, Caracas, Venezuelo (VEA, ap. 47675, Caracas 1041 A)
- 19-08: Internacia kurso por organizantoj de turismo, Havajo, Usono (Lucille C. Harmon, 1016 King Drive, El Cerrito, CA 94530 Usono)
- 26-18 dec.: Dabriga kurso, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Popola Altlernejo, Fako 192, S-691 24 Karlskoga, tel. +46/0586/503 60)
- 31-01: Konferenco de la Literatura Sekcio ĉe Bulgara E-Asocio, Plovdiv, Bulgario (BEA, adreso supre)

novembro

- fiksota: Internacia Lernejana E-Renkontiĝo, Kievo, Ukrainio (Kieva Centro "Esperanto", P.O.K. 539/1, UKR-254200 Kievo)
- 05-08: Eŭropa Renkonto de delegitoj de UEA, Budapeŝt-Pécel, Hungario (MOVILU, Hevesi Gy. út 107 II/8, Budapeŝt, tel. +36/1/271-9510)
- 07-08: 3-a Nacia Danuba E-ista Renkontiĝo, Svištov, Bulgario (E-societo, str. G. Matev 10, BG-5250 Svištov)
- 18-29: Aŭtuna Cseh-lernejo, Bjalistok, Pollando (Esperantotur, adreso supre)
- 20-22: Kulturaj Esperantaj Tagoj, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- precizigota: Aŭtuna Semajnfina Renkontiĝo, Ontario, Kanado (Ontaria E-Asocio, adreso supre)

decembro

- 04-06: Sankt-Nikolaaj Festo-Renkontiĝo, Zakopane, Pollando (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 04-06: 40-a Kultura Semajnfino de Sardinia Esperanto-Ligo, Homburg, Germanio (Josef Dörr, Querstr. 11, D-W-6607 Querschied)
- 07-08: Nacia Studenta E-ista Renkontiĝo, Vracsa, Bulgario (Esperanto, pk. 66, BG-3000 Vracsa)
- 11-13: 3-a Internacia Seminario "La Zamenhofa heredaĵo", Bjalistok, Pollando (Tow. Esperantystów, Pk 67, PL-15-950 Białystok)
- 28-02: Vintra E-ista Ferio, Budapeŝto, Hungario (HEA, adreso supre)
- 30-02: Silvestra balo - vintraj ekskursoj, Poprad, Slovakio (E-Centro de SEA, adreso supre)
- 30-12: Novjaro en Jekaterinburgo kaj ekskurso tra Rusio (Urala E-ista Societo, P.O.K. 67, 620077 Sverdlovsk; por eksterlando: Esperantotur, adreso supre)

1993

- 11-22 januaro: Aŭstralia E-Somerkursaro, Adelaide, kaj
- 23-25 marto: Aŭtobusa kaj tenduma rondiro de Aŭstralio (Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069)



Por ke romano estu klasika . . .

Maria kaj la grupo (1936). Emba (ps. de Imre Baranyai, 1902-1961). Vieno: Pro Esperanto, 1990 (2-a eld.). 180 p. 21 cm. 25,50 gld.
La longa vojo (1935). Richard Meyer. Vieno: Pro Esperanto, 1990 (2-a eld.). 140 p. 20 cm. 22,80 gld.
La granda aventuro kaj aliaj noveloj (1945). Ferenc Szilágyi (1895-1967). Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1989 (2-a eld.). 151 p. 20 cm. Esperantaj Klasikaĵoj 3. 16,50 gld.

Por ke romano estu klasika, necesas ke oni povu legi kaj legu ĝin. Tial meritas aplaŭdon reeldonado de daŭre valoraj verkoj. Prioritato estu la Baza Legolisto de la Originala Esperanta Literaturo, neriproĉeble kompilita de William Auld. Ankaŭ UEA povas kaj devas disdoni ĝin flugfolio en la kongresaj libroservoj, ekzemple en Vieno.

Laŭeble reaperu ankaŭ aliaj titoloj. Sed oni memoru, ke por ke verko estu klasika, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Oni do ne konfuzu la serion Esperantaj Klasikaĵoj de HEA (laŭ la Baza Legolisto) kun la serio Originala Literaturo Klasika de Pro Esperanto (viena eldonejo de Herbert Mayer). Al la unua apartenas *La granda aventuro*. Al la dua, *La longa vojo* kaj *Maria kaj la grupo*.

Oni povas diri, per la postparolaj vortoj de Vilmos Benczik, “ke *Maria kaj la grupo* laŭ enhavo estas verko iom eksmoda. (...) Kial do oni reeldonis tiun ĉi verkon? La respondo al tiu ĉi demando estas klara: tial, ĉar ĝi temas *pri ni, esperantistoj*, pri nia mikrosocio. *Maria kaj la grupo* estas la plej solida, kaj laŭ amplekso la plej granda beletra verko, kiu dediĉas sin ekskluzive al la prezento de la Esperanto-movado. Estas surprize, kiom konsekvence la kreantoj de la originala Esperanta literaturo ignoras la Esperanto-movadon, kiel temon.”

Persone mi ne konsentas, ke nia literaturo plene maturiĝos, kiam ĝi diros ion gravan pri ni, esperantistoj, al la neesperantista mondo, kaj ke por trovi tiun gravan direndon ĝi devus unue rakonti pri ni al ni mem, eĉ malgravavojn, kiel aksiomas la postparolo. Sed eble iuj verkistoj, leginte tiun ĉi romanon, opinios same. Eble ili verkos novan primovadan romanon, kun aktualaj kaj malpli naivaj satiroj de niaj kluboj kaj klubanoj, pri nia rilato al Zamenhofo kaj al nia historio. . . . La verkon oni povas uzi kiel diskuttemon en kluboj kaj renkontiĝoj (mi ĝin rekomendas al la estraranoj de TEJO kaj al kelkaj el ties membroj). Ekzemple,



mi klare kontraŭas ĝian tezon esprimeblan per la devizo “unue venas la movado kaj nur poste la propraj aferoj” (p. 94), i.a. ĉar Esperanto estas nur unu el multaj, gravaj aŭ kromaj, aferoj. Tial ne kortuŝas min la “senlimaj altruismo kaj sinofero” de Maria, la rolulino (p. 64 k.m.a.), nek la ekvacio morala = movada (p. 98), nek la ĝenerala prezento de Maria kiel sanktulino aŭ martirino kaj de Petro Baka kiel sia disĉiplo.

Pri *La longa vojo* eblas rediri plurajn el la samaj kritikoj. Ankaŭ ĝi montriĝas naiva, unulinia, unudimensia, eĉ se lingve kaj stile pli matura, pli flua, kvankam ĝi eldoniĝis en Kolonjo en 1935, unu jaron pli frue ol la romano de Emba. Kaj tamen ĝi tre plaĉis al mi. En sia speco ĝi estas tiel bona, ke ĝi apenaŭ meritas komentojn. Nun, kiam Eŭropo rehas aspekton similan al tiu antaŭ la unua militego, kiam

milmitoj da malriĉaj homoj migros el sudo kaj oriento en la eŭropan angulon serĉante laboron, panon kaj tegmenton, nun tiu ĉi romano pri la vivo de vaguloj kaj vagabondoj sur la longaj vojoj de Eŭropo iĝas tiom pli aktuala. Indas *vidi* kun li la scenojn en la noktrestejoj por vagabondoj, indas mediti kun li pri enkaptiĝo de homoj en drinkadon. Pri la aŭtoro oni scias nenion. Jen defio por k-do Golden (aŭ por k-do Ertl): Ĉu Richard Meyer mem vagabondis? Kiom membiografia estus do *La longa vojo*?

La novelaro *La granda aventuro* de Szilágyi estas senrezerve klasika. Eldonite en Stokholmo en 1945 ĝi plu freŝas, ĝi plu skuas legantojn. Kiu jam legis siladjiaĵon en 33 rakontoj aŭ en *Trezoro*, tiu scias kiaj majstraj noveloj atendas onin ĉi-kolekte. Kiel diras Benczik en laŭdinda librofina postparolo, “lia rakonta tono estas sordinita, filistre rezervema, sed oni sentas, ke ĉio ĉi estas nur kvazaŭ masko, kaj en la profundo tamen tempestas tragedio.” Tragedio pri homoj en tragedia tempo, la dua militego, kun siaj mizero kaj morno, temo konstante traktata de niaj literaturistoj (ni menciuj almenaŭ *Kiel akvo de la rivero* kaj *La granda kaldrono*) kaj, kiel nun ni ĉiuj vidas, daŭre traktota.



Tutan mondkoncepton ni trovas en la noveloj de Szilágyi. Laŭ Benczik, ili havas kiel ĉefan trajton de la rolulaj sortoj la fenomenon de *neplenumiteco*. Eble ĉar, kiel la aŭtoro mem skribis (p. 43), “la vivo estas efemera kaj estas maljuste aranĝi tiun efemerecon kvazaŭ oni vivus eterne.”

Kaj nun, ĉar temas pri majstro de nia beletro, mi rifuzas paroli pri lingvaĵoj.

Georgeo Kamaĉo (Hispanio)

Serve al nia literaturo

Serio "Originala literaturo klasika" de la Fondaĵo Pro Esperanto

La kapo de l' Gorgono. Lev Levenzon. Ed. kaj kom. H. Mayer. Vieno, 1989. 40p. 30cm. 22,80 gld.

Tra l' silento. Edmond Privat. Budaĵesto, 1989. 40p. 20cm. 7,80 gld.

Per espero al despero. Stanislav Schulhof. Vieno, 1989. 26p. 21cm. 8,70 gld.

Versaĵoj. Georgo Deŝkin. Vieno, 1989. 32p. 21cm. 7,20 gld.

En la brikejo. Józef Waśniewski. Vieno, 1988. 21p. 21cm. 7,20 gld.

La fantoma edzino. Eduard S. Payson. Vieno, 1988. 20p. 21cm. 6,60 gld.

El la klasika periodo de Esperanto. Antoni Grabowski kaj K. Bein (Kabe). Vieno, 1989. 36p. 21cm. 7,20 gld.

Pri Esperanta literaturo. Edmond Privat. Vieno, 1990. 32p. 21cm. 10,20 gld.

Ambician taskon starigis al si la Fondaĵo Pro Esperanto kaj la direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Herbert Mayer, kiu diris: "Ne malmultaj majstroverkoj [Esperantaj] simas en forgesado pro la simpla fakto, ke ne troviĝas reeldonantoj." Oni do komencis iom post iom rememorigi la frutempajn atingojn de nia literaturo. Jen kuŝas antaŭ mi ok kajeroj reprezentantaj ĉiujn ĝenrojn.

La diraĵoj de Mayer konfirmas la kajero dediĉita al Lev Levenzon. Ĉi tiu nun preskaŭ nekonata aŭtoro publikigis en la jaroj 1912-1916 sep poemojn proprajn kaj unu tradukon, el kiuj distingigaĵas teme kaj pense okversaĵo pri Napoleono. Eĉ pli interese, ke Levenzon kontribuis ankaŭ al la drama ĝenro. Senrezerve nomi dramoj liajn rimitajn kaj ritmitajn mitologiajn scenojn estas eble troigoj, sed sendube gravas ties historia valoro.

Reeldono de tri poemkolektoj el la unua periodo ŝajnas stabiligi la ĝisnunajn taksojn. *Tra l' silento* de Edmond Privat estas la plej matura teknike kaj samtempe la plej varia el ili.

*De l'tempo vokite la vent' en aŭtuno
L'arbaron trasiblas betulojn klinante,
Kaj orajn foliojn ebriajn de suno
Kun revoj plej karaj forblovas
konstante.*

(“La tempo”)

Domaĝe, ke malgraŭ brileco de la kovrilo la Privat-aĵo ricevis la plej malallogan aspekton, kion kaŭzas viola preso, haosa titolpaĝo, malakordo inter dika glacepapiro kaj misproporciaj tipetoj. Pruvas tion kompare la du ceteraj kajeroj poeziaj, kies eno estas fotokopiita el la iamaj eldonoj. Stanislav Schulhof prikantis antaŭ ĉio Esperanton. Versajne li estis la unua, kiu pririmis ĝin ankaŭ alie ol propagande aŭ alvokte.

*Vi deziras, sinjorino mia,
scii ion tute sen vualo
pri la vivo en rondeto mia (...)
nur en nia esperanta svarmo
nin kunigas speciala varmo
- ĉar ni ĝis nun tre malmultaj estas.*

(“Respondo”)



Klasika figuro: Grabowski

Ĉu ne interesa pensero? Versaĵoj de Georgo Deŝkin sonas plej flore-kore inter ĉi tiuj tri, kvankam ekzemple la desegno de maro estas tre subtila:

*Mevoj flugas gracie en rond'
Vel' blankiĝas ... kaj suna rebrilo
Kolorigas ŝaŭmaĵon de ond':
Mar' ekdormis en laca trankvilo.*

(“Maraj skizoj”)

Prozon enhavas du kajeroj. Per la unua reviviĝis *En la brikejo* de Józef Waśniewski, “la prezento de laborista mizero, la kolektiveco de la homa destino, la precizeco de la priskribo”. Herbert Mayer ĝuste substrekas en la postparolo, ke ĉi tiu naturalisma rakonto “estis en la jaro de sia apero moderna eĉ laŭ naci-lingvaj kriterioj. Kaj tiu estas mirinda escepto en la ofte postlamanta literatura produktado de Esperanto”. Tre kontraste al la rafinita prozo de Waśniewski, impresas sentimentala *La fantoma edzino* de Eduard S. Payson, rakonto pri homo kiu per la forto de sopiro kvazaŭ remateriigis por si la mortintan edzinon kaj mem mortis gvidate de ŝi al la regno de feliĉo.

La du ceteraj kajeroj ampleksas klasikajn priliteraturajn studojn. Julius Glück donis bazajn informojn pri la literatura agado de Kazimierz Bein kaj Antoni Grabowski. Li provizis la studon per analizo de teknikaj rimedoj ĉe Grabowski, per traduk-specimenoj ilustrantaj la metion de ambaŭ koncernatoj, kaj per resuma komparo surbaze de rakontero, kiun samtempe ili ambaŭ esperantigis. Edmond Privat prezentis sin al la legantoj kiel komentanto de la literatura procezo: “Unuecon de la lingvo konservas nur la komuna uzado (...) kiam en lingvo la homoj ne plu tradukas, sed pensas, kaj ne nur pensas, sed sentas kaj enmetas tutan sian koron, tiam estas nepre certa fakto, ke tiu lingvo estas lingvo vivanta.” La citaĵo eĉ hodiaŭ povus sanige influi kelkajn apudliteraturajn diskutojn.

Koran dankon al la Fondaĵo Pro Esperanto pro la komencita, modestrimea sed ege utila laboro, kiu permesas pli bone ekkoni la hieraŭon de nia lingvo kaj kulturo. Ek, al laŭvicaj kajeroj. Ni helpu aĉetante kaj legante.

Wojciech Usakiewicz (Pollando)

Eĉ se bona, tio ne sufiĉas

Vila mano, La. Idoj de Cereso (1928). H. J. Bulthuis. Vieno: Pro Esperanto, 1991 (2-a eld.). 300+14p. 20cm. 40,50 gld.

Inferio (1938). H. J. Bulthuis. Vieno: Pro Esperanto, 1990 (reprezo). 154p. 21cm. Ilustrita de Rico Bulthuis. 24,00 gld.

Hindrik Jan Bulthuis (1865-1945) estas unu el la historie gravaj Esperantaj verkistoj. Apud amaseto da lernolibroj, tradukoj kaj originalaj teatraĵoj li aŭtoris kvar originalajn romanojn, kiujn siatempe oni multe laŭdis pro modela stilo, sufiĉe simpla kaj senornama, por ke ankaŭ malpli spertaj legantoj povu ĝin mastri. Bulthuis eĉ konscie verkis por tia publiko: tial fine de *La vila mano* li listigis ĉiujn vortojn de la verko kiuj ne estas en la *Ŝlosilo* de Ĉefeĉ.

Laŭdire la romanoj de Bulthuis estis popularaj, kaj estas facile kredi tion. Ne nur la komforteco de la lingvo sed ankaŭ la felietone fluenta rakontado, kiu ne streĉas la cerbon de la leganto, povis kontribui al tio. Strange tamen, ke neniu el liaj romanoj aperis en dua eldono pli frue ol nun, post paso de pli ol duona jarcento. Samtempaj romanoj de Julio Baghy atingis eĉ plurajn represojn. En tio ĉi ne temas nur pri eldonistaj decidoj. La tempo juĝis, ke Baghy estas pli bona verkisto kaj pli bona stilisto, ankaŭ se temas pri facileco.

Estas afero de persona ŝato, ĉu *La vila mano* estas la plej bona romano de Bulthuis. Mi emas aliĝi al William Auld, kiu enlasis en sian bazan legoliston de Esperanta literaturo nur *Idoj de Orfeo* (1923). Nu, se oni ŝatas unu, ankaŭ la alia plaĉas, ĉar en ambaŭ oni trovas tion kion Bulthuis vere sukcesis fari bone: bildigi la nederlandan kamparan vivon. Li estis enamiginta al la regiono de sia infanaĝo en la norda parto de Nederlando. Sendube ankaŭ *La vila mano* dankas sian scenejon kaj la vivecajn rolojn ne tiom al la fantazio de la aŭtoro kiom al liaj rememoroj. Tion konfirmis ankaŭ lia filo Rico, mem fekunda verkisto, en

intervjuo por *Literatura Foiro* (februaro 1983). Certe ankaŭ la kuntena elemento, la superstiĉo pri la vila mano, ne estas elpensajo de la aŭtoro sed de liaj iamaj samvilaĝanoj. La vila mano estas simbolo de la konscieco. Ĝian malagrablan tuŝon oni sentas, kiam oni cedas al ŝtelo aŭ alia friponaĵo, kaj oni eĉ imagas vidi tiun timigan manon. Eble por la meritoj en priskribo de la kampara vivo de la lando *La vila mano* aperis ankaŭ en la nederlanda. Sed kiel atestas Rico Bulthuis, unu el la tradukintoj, ĝi malbone vendiĝis.

maŝinoj plifaciligas la vivon ktp., sed tie ankaŭ disfloras krimoj kaj pro merkataj spekulajoj oni bruligas duonojn de la rikolto, dum amaso da popolanoj malsatas. En la lando de blinduloj ĉio estas simpla kaj neevoluinta, sed neniu malsatas kaj krimo estas nekonata vorto. Bedaŭrinde la rakonto estas tro ŝablona, nekomplicka kaj deklara.

Do, ĉu valoris reeldoni la du librojn? Ne. Ja estas esceptoj, sed se dum pli ol duona jarcento iu verkis ne estis represita, ĝi ankaŭ ne meritas represon. Bulthuis estas grava nomo

“... jen subite
vila, nigra brako
elŝovigis mal-
rapide ...”



Julio Baghy iam skribis, ke li tre atendas de sia kolego la unuan porjunularan romanon en Esperanto. Bulthuis certe havis talenton por tia verko; li ja redaktis i.a. koncizan version de *Robinsono Kruso*. Tiun esperon li tamen ne plenumis, kaj la unua ampleksa romano por junularo ankoraŭ atendas aŭtoron. En la alia represita verko, *Inferio* el 1938, Bulthuis tamen provis novajn ĝenron kaj medion. *Inferio* estas lia lasta kaj plej malbona romano, stumbla provo de sciencfikcio, kiu celis redoni lian abomenon kontraŭ la hipokriteco kaj senmoraleco de kapitalismo.

Tri junuloj el insulo, kie ĉiuj loĝantoj estas blindaj, ricevas per simpla operacio vidkapablon kaj vizitas la mondon de vidantoj, *Inferio*. Tie ĉio estas superevoluinta,

de nia literaturo, sed sufiĉas ke li estu reprezentita en antologioj kaj krestomatiaj. *La vila mano* apartenas al la pli bona duono de Esperantaj romanoj. Ĝi tamen estas tro ekmdoma por la nuna legantaro, tiel ke ĝi neniel povas trovi sufiĉe da aĉetantoj. Tiuj kiuj vere volas studi la evoluon de nia romanarto, sufiĉe facile trovas ĝin inter brokantaĵoj. *Inferio* simple estas malbona. Se vere necesis represio de Bulthuis, kial ne lian teatraĵeton *Malriĉa en spirito*, kies malgranda amplekso ne postulas grandan investon? Kial perdi monon en represoj kiuj malbone vendiĝas, dum valoraj manuskripto ĝimas en tirkestoj? Eĉ se ankaŭ ili ne vendiĝas, per ilia aperigo oni almenaŭ pliriĉigus nian literaturon.

Osmo Buller (Nederlando)



Angolo: Vendreda, varba diskuto

Kadre de la "Vendredaj diskutoj" de la Unuigo de Angolaj Verkistoj, Faria de Bastos, prezidanto de Portugalga E-Asocio, prelegis ĉe la UAV-sidejo en Luando la 4-an de decembro. El la 50 ĉestantoj, inter kiuj verkistoj kaj ŝtataj altranguloj, 17 surloke mendis E-gramatikon. (*Nia bulteno*)

Aŭstrio: Nia vizitkarto ĉe la televido

La trian fojon okazis en Vieno Expolingua, foiro pri lingvoj, de la 16-a ĝis la 19-a de januaro. Du Esperantostandoj aliris 110 partoprenantojn por surloka Cseh-kurseto, kaj varbis por korespondaj kursoj kaj la UK. Elsendiĝis okazaj radio-intervjuoj, kaj en la aŭstria televido estis videbla vizitkarto kun la 16 reguloj. (Walter Klag)



Ĉinio: Por reformoj kaj malfermo

Post la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto (Kunming, 1985) necesi atendi ses jarojn ĝis la dua, kiu okazis en Tangshan inter la 30-a de decembro kaj la 3-a de januaro. Dek prelegoj traktis la kongresan temon "Reformado, malfermo kaj Esperanto". Reprezentantoj el Sanhajo, Tianjin kaj Qingdao parolis pri la bezono je pli da internaciaj sciencaj kaj kulturaj rilatoj. Atento-centre staris ankaŭ la preparoj por la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto, 17-22 aŭgusto en Qingdao. (*El Popola Ĉinio*)

Japanio: Kvar tagoj da amikiĝo

De la 31-a de decembro ĝis la 3-a de januaro okazis trans-jara kurs-kunveno en Kameoka, ĉe la Oomoto-centro. Inter la 90 partoprenantoj el ses landoj okulfrajis la amaseto de koreoj (precipe junaj koreanoj). La plej grava faka kunsido temis ĝuste pri "Influo de Esperanto en la rilato inter Japanio kaj Koreio". (Reza Hejr-Hah)

Katalunio: Kultur-historie pri loka movado

KEA-estraro kaj delegito en la urbeto Manlleu, Bartomeu Costa, sukcesis persvadi lokan ĵurnaliston eldoni numeron de la 16-paĝa kultura suplemento *Imatges* de la semajna gazeto *La Marxa de Catalunya* pri la historio de la loka movado en Manlleu (vd. foton). Eblas gratuli la ĵurnaliston, Francesc Farrés i Malian, ĉe: Marxa de Catalunya, Bisbe Morgades, 50-entresol, 08500 Vic. (Libert Puig)

Rusio: Mortis SEU, vivu REU!

Post la definitiva disfalo de Sovetio, ties tutlandaj strukturoj transiras sub la jurisdikcion de Rusio. Simile okazis al Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), kiu en sia 10-a kongreso (27-29 decembro) decidis transformiĝi al Rusia Esperantista Unio (REU). Jura heredanto de SEU, REU baziĝas sur la movado en Ruslando, sed povas membri en ĝi esperantistoj el ĉiuj eks-sovetiaj ŝtatoj, kaj eĉ el aliaj landoj. La adreso de REU: a/k 57, RUS-105318 Moskvo-318, Rusio. (Boris Kolker)

IMATGES...

Records de la vida a Osona i el Ripollès

Volum II Núm. 9 18 de novembre de 1991 128 pgs.

MANLLEU A TRAVÉS DE LA FOTOGRAFÍA (VI)




Vatikano: Vic-episkopo pedas por Esperanto

"Kontraŭ lingva imperiismo la latina estus bona solvo, sed ĝi ne plu estas uzata kiel antaŭe. Praktikebla solvo estus Esperanto" diris Mons. György Jakubinyi, hungara vic-episkopo de Alba Iulia (Rumanio), en Vatikano, la 29-an de novembro, dum la Sinodo de Episkopoj. Multaj novaj-agentoj diskonis ĝian liron.



Ukrainio: Tutuniaj manageroj

En Slavjansk antaŭ nelonge fondiĝis novtipa supera lernejo, la Tutunia Institut de Administro (lerna centro por manageroj). Ekde septembro funkcias ĝiasine Esperanto-centro, kiu celas i.a. aperigi broŝurojn, organizi instruadon kaj aranĝi ekspozicion "Tuta mondo en unu ĉambro". Sendantoj de grandformataj, ĉiataj fotoj ricevos donacon. (Induku la titolon kaj tion, ĉu vi fotas profesie aŭ amatore.) E-centro, a/k 17, 343206 Slavjansk. (Dmitrij Cibulevskij)



Bahaismo: BEL kreskadas kaj agadas

Jam pli ol 450 esperantistoj membras en Bahaa Esperanto-Ligo, kiu disvolvas vigan programon de aranĝoj, eldonaĵoj kaj kontaktoj kun la neesperantista bahaa movado. En 1992 BEL partoprenos en la Bahaa Mondkongreso en Novjorko, distribuante faldfoliojn pri Esperanto. (*Belmonda letero*)

Filatelio: Okazaj stampoj

Por honori la 80-jariĝon de Venezuelo Esperanto-Asocio, la landa poŝto uzis specialan stampoĉiaron dum la lasta semajno de januaro 1992. Kovertetoj aŭ pk-oj stampitaj per ĝi haveblas ĉe VEA, Ap. 47675, Caracas 1041 A.

Pri la specialaj stampoj, pk kaj koverteto, lanĉotaj ĉe la IFEF-Kongreso en Münster (16-22 majo), informiĝu ĉe Werner Heimlich, D-W-3040 Soltau, Fröbelstr. 4, Germanio.

Filmo: Tricent minutoj da Orienta Eŭropo

Skipo de la franca firmao Interland, gvidata de Alexandre Rousset, realigis – dank’ al Esperantaj kontaktoj – cent intervjuojn kun plejparte junaj loĝantoj de ok orienteŭropaj landoj, en la formo de 3-minutaj videoklipeoj.

Interlingvistiko: En prestiĝaj fak-eldonaĵoj

Ankoraŭ en GDR, aperis en 1990 la Aktoj de la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj (Berlino, 1987). Ĝiaj volumegoj entenas kontribuojn pri ĝenerala interlingvistiko kaj pri la DLT-projekto. En la longoma revuo *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* publikigis en 1991 ne malpli ol 7 interlingvistikaj materialoj. Plej elstaras la intervjuo, kiun en 1987 faris F. Lo Jacomo kaj D. Blanke kun la mondfama lingvisto André Martinet. Ĝia teksto baldaŭ aperos en

la serio Esperanto-Dokumentoj de UEA.

Ankoraŭ en Sovetio, eldoniĝis *Lingvistika Enciklopedio Vortaro* (1990), kiu prezentas la internaciajn kaj artefaritajn lingvojn, unuafaze en tiulanda enciklopedio, en inda amplekso kaj objektiva tono. (Detlev Blanke, Nikolaj Stepanov)



Jurnalismo: Denove internacie

Post vekigo dum la lasta UK, Tutmonda Esperantista Journalista Asocio reaktivigis. Sub la redakto de prezidanto Stefan Maul aperis jam tri numeroj de la kvaronjara asocia organo, *Internacia Journalisto* (vd. supre). Maul alvokas ĉiujn profesiajn kaj amatorajn kolegojn peti aliĝilon aŭ pruvnumeron ĉe la administrado de TEJA (FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio) aŭ ĉe Maul (Pferseer Str. 15, D-W-8900 Augsburg, Germanio).

Komerco: Informistemoj per Esperanto

La revuo *Monda merkato*, kiu ekis kiel modesta anoncgazeto en 1990, nun funkcias kiel vera komerca informistemo, dank’ al kunlaborantoj en pli ol 80 landoj. Simile uzas Esperanton, kiel “fluigilon” de informoj, la hungaraj *World-Contact Business Plus* kaj *1001. La eta gazeto* (Triesto) regule publikigas varo-ofertojn de esperantistoj, laste ekz. pri pastomaŝinoj, aŭtaj riparpecoj kaj kondomoj.

Ankaŭ en Italio, Giovanni Conti jam reklamas siajn hundo-biskvitojn per Esperanto (vd. bildon dekstre).

Konkursoj: Popolaj rakontoj premiotaj

Fundación Esperanto, Hispanio, lanĉis Internacian Literaturan Konkurson por popolaj rakontoj. La premio Sancho-Rebulla (12 000 pesetoj) kaj ties subpremion (6 000 pesetoj) povos gajni konkursaĵoj 4-6-



Masaĝo: Diplomitoj kaj -otoj en Centra Eŭropo

Dek da masaĝistoj ekzameniĝis sukcese en Beograd por kurac-rajtiga diplomo pri la “Orienta Speciala Diina Masaĝo” de Saionji Masayuki. Ankaŭ en Zagrebo okazis tritaga kurso por 30 personoj. La interpreta lingvo de la kurso ambaŭkaze estis Esperanto. La instruanto, Hashimoto Shigeru, lernis ĝin sole por disvastigi la metodon.

En Pápa (Hungario), la Esperanta kompanio Altermed organizas kursojn pri tiu ĉi masaĝo kaj pri aliaj alternativaj kurac-metodoj. (T. Kapista, J. Rey Hudeček)

paĝaj, tajpitaj en kvin ekzempleroj, sendendaj sub pseŭdonimo (la vera identeco kunsendiĝu en fermita koverto) antaŭ la 30-a de septembro al Enrique Piquero, Moreria, 6, 5-to D, E-50004 Zaragoza. La verdikto publikigis en la Zamenhof-tago.

La Nova Talento de Belartaj Konkursoj, la portugalo Gonçalo Neves daŭrigis rikolti premiojn, en la konkurso "Ivo Rotkvič 91". Krom liaj duaj premioj en poezio kaj etprozo, distingigis Nevenka Tomić el Makedonio (poezio) kaj Vesna Skaljer-Race (Beograd) pro la traduko de la romano *Familio Talbe*.

Moderna muziko: Avangarda verko de Rössler-Schulz

En Mannheim (Germanio) okazis, la 27-an de oktobro, la premiero de la avangard-stila muzikaĵo *Evoluo*. Laŭ mendo de la renomata *Asocio en Mannheim por Nova Muziko*, la komponaĵo de Franz-Georg Rössler kun la Esperanta teksto de Rikardo Sulco elvokas la danĝerigon kiuj minacas la homaran ekziston. La verko prezentis la konata *Figuralchor Mainz* sub la dirigentado de Stefan Weiler.

Opero: La tragedio de l' homo

Laŭ ideo de Imre Néhéz (Hungario), la hungara kaj aŭstria Esperanto-asocio anoncas la estiĝon de fondaĵo celanta krei financon bazon por la komponigo de esperantlingva opero el la *Tragedio de l' homo* de Madách. La prezento okazu dum la Monda Ekspozicio en Budapeŝto (1996). Adreso: H-8500 Pápa, pf. 250, Hungario. (*Aŭstria E-Retuvo*)

Plurlingva porhundaĵo ...



Popmuziko: Nova kompakt-disko

Dek du kantoj, ĉiuj en Esperanto, troviĝas sur la nova kasedo/kompakt-disko de la "rokanta policisto" Rainer Conrad el Germanio. Laŭ ideo kaj kun helpo de Gunter Koch, lia grupo *Tutmonda Muziko* kreis la diskon "Esperanto" (kun samtitola ĉefkanto)

celante plej vastan, ekstermovadan publikon. La produktintoj alvokas peti la muzikaĵon ĉe radioj kaj mendi, por plia diskonigo, aŭsojn kaj glumarkojn ĉe Gunter Koch, Hohbergstr. 7, D-W-70377 Magstadt, Germanio.


Scieno: Refloru franca bukedo

Post la apero de kvin numeroj de *Scienca Bukedo el Francio*, la redaktoro Christian Bertin (60 allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sévigné) alvokas artikolantojn por la sesa "bukedo", kiu aperos kiel speciala numero de *Franca Esperantisto*.

Sindikatismo: Paŝoj al eŭropa enciklopedio

La brita sekcio de SAT publikigis *Handy English/Esperanto ABC*, terminaron pri sindikatismo kaj laborista movado. Belgaj esperantistoj-sindikatisoj en Namur kaj Oostende aldonis la francajn kaj nederlandajn ekvivalentojn. (Tiel estiĝis *unuajoje* tutbelgia, franca-flandra terminaro pri tiu temo!) La iniciato ruliĝas plu: se vi pretas helpi ĉe la esperantigo de la 10-lingva *Glosaro de la mondo de laboro kaj de la sindikata movado* (eldonis la Eŭropa

Komisiono) aŭ en la elfrancigo de *Enciklopedio de la sindikatisto*, turnu vin al FGTB-Esperanto, 3 rue des Brasseurs, B-5000 Namur, Belgio.



Spirita sano: Informilo en Esperanto havebla

La Bruno Göring-amikaro de disvastigas la saniĝo-doktrinon de sia nomdonanto (1906-1959, vd. supre), kies sukcesoj ankaŭ ĉe nekuraĉeblaj malsanoj estas konfirmataj de kuraĉistoj. Pria informilo estas havebla ĉe Detlef Meier, Marktplatz 8, D-W-6050 Offenbach, Germanio.

Persone



Adanou: Disertacio pri monda problemo

Efoe Adanou, multjara togolanda amiko de la Esperanto-klubo en Hilversum (Nederlando), sukcese finis sian studon en la universitato de Lomé (Togolando) per disertacio pri *Kompara studo de morfologiaj kategorioj de la franca lingvo kaj Esperanto. Kian lingvon por la monda estonteco?* (A. J. Middelkoop)

Baudé: Saniĝo post aŭta akcidento

Apenaŭ Esperanto publikigis intervjou kun la eldoneja estro Christian Baudé el Francio (dec. '91), lin trafis grava aŭto-akcidento. Felice, li jam ekretrovas sian sanon. Multe pli grave vundita, lia kunveturintino Solange readaptiĝas al funkciigo de siaj plej trafitaj membroj, la dekstra brako kaj la du kruroj. (*SAT-Amikaro*)

Ciccanti: Ripozo por la "fluganta monaĥo"

Celebrinto de la unua Esperantlingva meso en 1965, konata pro siaj vojaĝoj por Esperanto, la itala pastro Albino


Ciccanti retiriĝis el Rimini, kie li estis paroĥestro, al la franciskana konvento de Forlì, kiel ties superulo. La 61-jara pastro intencas pli aktivi kiel fakdelegito de UEA.

Dorval: Dekmiloj da libroj

Post hungara eldono en 30 mil ekzempleroj (1990, trad. István Ertl), la originala krimromano de Deck Dorval (Frans van Dooren), *Kazinski venas tro malfrue* nun furoretas en la pola. *Kazinski przychodzi za półno*, poligita de Wojciech Usakiewicz, aperis en 30 mil ekzempleroj ĉe *Epoka*, Varsovio. Malofte Esperanta literatura verko atingis tian konektecon en aliaj lingvoj.

Kamačo: Ekstermovada mendo

De la 18-a ĝis la 22-a de novembro, okazis en la universitato de la hispana urbo Murcia kongreso pri la vivo kaj verkaro de la murcia aŭtoro Miguel Espinosa (1926-1982). La kongreso invitis Georgon Kamačo prelegi pri sia Esperanta traduko, mendita de esploristoj pri Espinosa, el ties romano *La turpa burĝaro*.



Larglantier: Rekorda UEA-postenulo

Kiel vi povis legi en la decembra numero, la prizorganto de la rubriko "Esperanto en radio", Georges Larglantier (supre), rezignis pri tiu tasko. Lia unua radio-tabelo aperis jam en januaro 1950! Notindas, ke neniu ĝis nun tenis tiom longe – 42 jarojn – difinitan postenon ĉe UEA. Lia posteulo estas Josef Lechermaier.

Moleón: Kvin jarojn en la CO

Post pli ol kvinjara deĵoro, en septembro 1991 demisiis el sia posteno ĉe la CO de UEA Francisco Javier Moleón. Dum tiu periodo li ĉefe okupiĝis pri la Jarlibro de UEA, kaj krome kunlaboris en aliaj branĉoj de la oficejo (kongreso, katalogo, libro-servo). Ni bedaŭras pro la malfrua sciigo.



Sanchez: Kataluna venko

La 16-jara esperantistino Ingrid Goset Sanchez (supre) estis elektita "Belulino de Esperanto 1992" en Sabadell, Hispanio.

Nekrologo

William Solzbacher (1907-1991)

La 27-an de decembro mortis William Solzbacher, elstara figuro de la internacia kaj precipe usona Esperanto-movado. Doktoro pri politikaj kaj ekonomiaj sciencoj, lingvisto kun aktiva scio de naŭ kaj pasiva rego de multaj pliaj lingvoj, interpretisto, organizanto de internaciaj kongresoj, ĵurnalisto, verkisto, universitata lekcisto, Solzbacher tra sia vivo aktive membriis en tuta aro da sciencaj instancoj kaj akademioj.

Li esperantistiĝis en sia naskiĝlando Germanio en 1921, varbita de Mondjunularo Katolika, kies ĉefsekretario li iĝis. Li redaktis ties revuon *La Juna Batalanto*. En 1933 li devis, pro sia katolika-pacifisma sinteno, forlasi Germanion, por pasigi plurajn jarojn en Belgio, Francio kaj Luksemburgio. Li faris prelegvojaĝojn pri Esperanto en Eŭropo kaj Usono, kie li vivis ekde 1941. Dum pluraj jaroj (ĝis 1953) li estis prezidanto de Esperanto-Asocio de Norda Ameriko. Li kunredaktis

Amerika Esperantisto, en kiu li publikigis multajn valorajn studojn kaj eseojn pri la lingvo kaj movad-historio. Li estris la Esperanto-programon, kiun la radiostacio Voĉo de Ameriko eksperimente elsendis en 1960-61.

Solzbacher estis membro de la Akademio de Esperanto ekde 1949. Kiel homo de granda klerio, kiel politik-sciencisto kaj sociologo, li kontribuis al la scienca esploro de Esperanto el perspektivo ofte neglektata. Bedaŭrinde, la plimulto de liaj artikoloj ne atingis larĝan publikon. Tragike, ke post la forlaso de la hejmlando, ankaŭ poste en Usono iuj cirkonstancoj (ankoraŭ iom misteraj) de la kontraŭkomunisma febro de makartiismo en la kvindekaj jaroj distancigis lin de la ĉeffluo de la E-movado, kvankam li estis relative ofta gasto en la Universalaĵ Kongresoj (laste en 1978).

Li estis kunlaboranto de *Enciklopedio de Esperanto* kaj kun-aŭtoris lernolibron *Esperanto: The World Interlanguage* (1948). Solzbacher estis unu el la plej erudiciaj personoj, kiuj iam ajn aktivis por Esperanto.

La Internacia Esperanto-Muzeo dum la Universala Kongreso

La Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 Vieno, rekte en la centro de Vieno, bonvenigas vizitantojn dum la UK en 1992

lunde-vendrede, inter la 10-a kaj 17-a horoj.

La Muzeo estas nun en periodo de renovigo, kies unua fazo finiĝos ankoraŭ antaŭ la somero. Pretos unu salono, kie troviĝas mal-konvenca informo pri Esperanto en naciaj lingvoj kaj – kiel speciala ekspozicio okaze de la UK – vitrinaj kun manuskriptoj de Zamenhof kaj aliaj pioniroj.

Pro la multaj vizitantoj dum la UK estos eble konsulti dokumentojn de la Muzeo nur se vi antaŭe en leteroj indikos, kion vi ŝatos vidi.

Kiel specialan servon al la kongresintoj ni ofertas

Kulturan semajnfino

post la kongreso, sabate kaj dimanĉe, la 1-an kaj 2-an de aŭgusto. Programo: renkontiĝo kun Esperanto-verkistoj, diskutoj, prezento de novaj verkoj ktp. Partopreno senkosta, sed necesas skriba aliĝo kaj ricevo de konfirmo flanke de la Muzeo. Limigita nombro de partoprenantoj!

Ĉu vi jam legis? *Dek rakontoj el Vieno*. 32 paĝoj, 4,80 gld. *Hospitalo sepetaĝa*. Originala novelo. 16 paĝoj, 3,00 gld. *Sukero, nutrado, kario*. 20 paĝoj, 3,00 gld. Mendoj: Libroservo de UEA.

Bv. saluti la trian lernejon en Ĉikago kiu ekinstruas Esp-on. S-ino Ruby Bowen, Joplin School, 7931 S. Honore, Chicago IL 60620, Usono, instruas 11 geknabojn, 10-12-jarajn.

Marŝado montara kun kantemaj bulgaroj ĉi-somere. Ivan Apostolov, Ekzarĥ Josif 13, Petriĉ, 2850 Bulgario.

Korespondantoj de "Princo" Henry Oguniye, Niĝerio, bv. kontakti s-ron H. Bakker, Kastelenstr. 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

Mi proponas belan libertempon en Prago aŭ en muelejo en ĉirkaŭaĵo de arbaroj. Jindřich Nosek, CS-142 00 Praha 4 Pšnice.

Sonmagazino havebla tute senpage. Oni devas alsendi kasedon 90-minutan, novan aŭ uzitan. Adreso: Adamo P. Goralski, str. Generalo Fanjul 17-1D, E-38006 Santa Cruz de Tenerife, Hispanio.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj *kostas 1,40 guldenojn (unu internacian respondkuponon)*. Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Pliaj kunlaborantoj pri la revizio de Plena Ilustrita Vortaro estas bonvenaj anonci sin ĉe Michel Duc Goninaz, Val Saint-Georges, Chemin de l'Echelle, 13100 Aix-en-Provence, Francio.

UEA-membro Carles Sastre kaj liaj kunmalliberuloj, membroj de sendependisma kataluna organizo, komencis malsat-strikon por esti translokitaj al kataluna prizono. Sendu solidarecmesaĝojn al Carles Sastre/Carles Benitez/Macià Manera, Presó de Lleida-2, Apartat 426, E-25080 Lleida, aŭ proteston al la kataluna justic-estro Sr. Agustí Bassols, Conselleria de Justicia, c/Pau Claris 81, E-8010 Barcelona.

Se filologio interesas vin, aliĝu al IUEF pagante 8,80 gld. al iuef-ŝe UEA aŭ per 7 irk. (aŭ eŭroĉeko) al la peranto R. Moerbeek, Zwaansmeerstr. 48, 1946 AE, Beverwijk, Nederlando. Artikolojn por *Filologo* bv. sendi al S-ro V. Oljanov, kv. Emil Markov, p.k. 66, 1404 Sofia, Bulgario.

De la 26-a ĝis la 30-a de julio okazos en Amsterdamo, Nederlando, la Internacia Humanisma Kongreso, organizita de Internacia Humanisma kaj Etika Unio (IHEU). La temo estos "Humanismo por kapo kaj koro". Esperantistoj intencantaj partopreni kontaktu: K. Ruij, P.K. 31069, 6503 CB Nijmegen, Nederlando, tel. +31/80/580320, fakso +31/80/79.

39-jara komencantino ŝatus korespondi. Rŭta Kleveviĉienė, Marijampoli, Vytenio 14-21, Litovio.

La redakcio de *Veterana Esperantisto* (Changsha, Ĉinio) okazigos ekspozicion de libroj kaj ĵurnaloj, kaj intencas fondi Esperantan Libra-Ĵurnalan Bibliotekon Internacian en Changsha. Ni esperas je via donac-helpo. Adresu al Wu Chang Shen, 410007, Xiao Linzichun 90, Changsha, Hunan, Ĉinio.



Ĉu vi ŝatas rustikan medion? Malkovru la vilaĝon IGGELBACH, la koron de la naturparko "Pfelcer vald" (Palatinata Arbaro), en idilia germana valo! Meze de pinarboj, la gastejo "Haus Mühleck" (Esperante: "Domo Muela Angulo") malfermas sin por Esperantujo. Ekskursu, konferencu kaj feriu ĉe Waldspeisegaststätte "Haus Mühleck", IGGELBACH, Am Mühleck, K 17, D-W-6738 Elmstein 2 (germanlingvaj informoj). Informoj en Esperanto ĉe Esperanto-Centro Humanismo, IGGELBACH, Schlossgasse 30, D-W-6738 Elmstein 2.

Ĉu vi jam konas tiujn ĉi librojn?

Famaj tradukaj verkoj de prof. ŜULCO Rikardo:

BOTO: *Amuza legado pri Til' Strigospegul'*; 376 p.; 36,00 DM (havebla ankaŭ la Germana originalo por 14 DM)

ĈERSKJO: *Banalaj historioj*; 168 p.; 24,00 DM (havebla ankaŭ la Germana originalo por 26 DM)

BURJERO: *Per mirigaj aventuroj piprita vojaĝo Rusujon de barono FONMUNKHAŬZO*; 32 p.; 6,00 DM

Mendu ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la

Esperanto-Centro, D-W-4790 Paderborn, Pf. 1450

Telefono 05251-27612; Telefakso 05251-21507
Petu nian novan Libroliston n-ro 9.

Libroj el Israelo

Mendu ĉe Esperanto-Ligo en Israelo, POK 1289, 61012 Tel Aviv. Prezoj en usonaj dolaroj; 15% rabato por 3 ekz. aŭ pli, 33% rabato por pli ol 9 ekz. Sendokostoj estas ĉ. 5%.

- **Pri internacia lingvo dum jarcentoj** - I. Dratwer, 1977, 366p., \$16.
- **Antologio de la Hebrea poezio** - J. Kohen-Cedeck, 1986, 268p., \$27.
- **Vortaro Hebrea-Esperanta** - J. Murjan, 1989, 160p., \$10.
- **Israelo Kantas** - Chantal, red. A. Wandel, 1982; 2a eld. 1986, kasedo 40 min, libreto 20p., \$12 (nur kasedo \$10).
- **Venis Vespere** (infantilbro) - F. Bergstein, trad. A. Wandel, 1987, 20p., \$3.
- **Salato** - M. Savir, 1984, 160p., \$13.
- **ELIZA** (Konversacia programo) - A. Wandel, 1988, 5-cola moldisko por IBM PC-komputiloj, kun instrukcioj, \$5.

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

La Chaux-de-Fonds SVISLANDO

Grava parto de Esperantujo
Venu esperantigi • progresi • esperantumi • kongresi
Petu nian riĉan programon!

KCE, pf. 779, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

UEA reeldonis la bazan gvidilon por instruantoj de la internacia lingvo:

metodiko de la esperanto-instruado

de Rudolf Rakuša (1893-1970)

Temas pri 3-a eldono de la verko

unue aperinta en 1957 kaj kompletigita en 1970. 189p. 20cm. ISBN 92 9017 045 X.

Prezo: 15,00 gld Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Havebla de la Libroservo de UEA.



FUNDAMENTA KRESTOMATIO estas denove aĉetebla!

La nova 18-a eldono, prinotita de prof. G. Waringhien, faras maksimumajn klopodojn tekste reiri al la 1-a eldono de 1903, sed grafike resti ĉe la bela 17-a eldono de 1954.

18 + 446 paĝoj. Tole bindita kun legrubando kaj kromkovrilo. 21cm. ISBN 92 9017 044 1. Prezo: 48,00 guldenoj (32,00 gld. ekde 3 ekzempleroj).

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

Tri vojaĝoj al Ĉinio

Lige al la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto 1992 en la ĉina marborda urbo Qingdao (norde de Sanhajo), UEA organizas grupan vojaĝon el Eŭropo. La celo estas ne nur buntigi la Kongreson kaj apogi la disvastigon de Esperanto en tiu parto de la mondo sed ankaŭ konatiĝi kun unu el la plej antikvaj kaj fascinaj landoj, kia estas Ĉinio. Ni faris tri vojaĝoprogramojn, kun ekveturo el kvar eŭropaj urboj. Ĉiuj tri programoj okazas per la flugoj de la fidinda kaj renoma germana flugkompanio Lufthansa. Jen la detaloj:

Programo 1 (13-24 aŭgusto): Ekvojaĝo la 13-an de aŭgusto je la 17h00 el Frankfurto, per rekta flugo al Pekino, kiun vi atingos la postan matenon je la 08h20. Tritaga restado en Pekino, kun ekskursoj i.a. al la Imperiestra kaj Somera Palacoj kaj al la Granda Muro. La 17-an de aŭgusto flugo al Qingdao kaj 5-taga partopreno en la Kongreso, kun du onttagaj kaj unu tuttaga ekskursoj, bankedo, transporto ktp. Reflugo al Pekino la 23-an kaj al Frankfurto la 24-an de aŭgusto, kien vi atingos samtage je la 14h25. La prezo inkluzivas ĉiujn tranoktojn (en dulitaj klimatizitaj ĉambroj kun banejo), manĝojn kaj ekskursojn. **Prezoj:** el Frankfurto 3980, el Parizo 4580, el Amsterdamo 4630, el Milano 4810 guldenoj. Krompago por unulita ĉambro en Qingdao: 260 guldenoj.

Programo 2 (13-31 aŭgusto): Kiel Programo 1 ĝis la fino de la 5-a Pacifika Kongreso. La 22-an de aŭgusto vi flugos por dutaga konatiĝo kun Sanhajo, poste trajnos al la lagoborda ĝardenurbo Hangzhou, de tie daŭrigos fluge la 27-an al Guilin kaj ties spirhaltigaj subtropikaj pejzaĝoj. La 29-an flugo al Guangzhou (Kantono), kaj la postan tagon al Honkongo. Post duontaga konatiĝo kun la honkongaj bunto kaj verso, ekflugo je 23h15 por atingi Frankfurton la 31-an de aŭgusto, frumatene je la 06h05. La prezo inkluzivas ĉiujn vojaĝkostojn,

ekskursojn, tranoktojn (dulita klimatizita ĉambro kun banejo) kaj manĝojn. **Prezoj:** el Frankfurto 5205, el Parizo 5805, el Amsterdamo 5855, el Milano 6035 guldenoj. Krompago por unulita ĉambro en la Kongreso kaj poste: 520 guldenoj.

Programo 3 (7-24 aŭgusto): Vi ekflugos el Frankfurto la 7-an de aŭgusto je 14h35 kaj atingos Honkongon la postan matenon je 08h35. Libera tago kaj tranokto en Honkongo, por la 9-an de aŭgusto flugi al Guangzhou (Kantono), kaj la 10-an daŭrigi al Guilin kaj ties naturbelaĵoj. La 12-an vi flugos al Xi'an, kiu dum pli ol 1000 jaroj estis la ĉefurbo de Ĉinio kaj kiu ravis vin per sia Muzeo de Terakota Legio. Sekvas flugo kaj dutaga restado en Pekino, kun ties palacoj kaj la Granda Muro, por la 17-an flugi al Qingdao kaj la 5-a Pacifika Kongreso. Tie vi ĝuos la saman aranĝon kiel en Programo 1. Vi reflugos al Pekino la 22-an, vizitos tie pliajn vidindaĵojn, por la 24-an je la 10h20 ekflugi kaj atingi Frankfurton samtage je la 14h25. Kiel en la unuaj du programoj, la prezoj inkluzivas ĉiujn vojaĝkostojn, ekskursojn, tranoktojn (dulita klimatizita ĉambro kun banejo), ĉiujn manĝojn ktp. **Prezoj:** el Frankfurto 5465, el Parizo 6065, el Amsterdamo 6120, el Milano 6295 guldenoj. Krompago por unulita ĉambro de Kantono ĝis la fino de la Kongreso 550 guldenoj.

Mendoj: Ni rezervis nur tridekon da lokoj en la menciitaj flugoj. Se vi interesiĝas pri unu el la tri variantoj, skribu rapide, telefonu aŭ telefaksu vian interesiĝon al UEA. Ni sendos tiam al vi mendilon kaj plian detaljon. Se restos lokoj, ni povos akcepti mendojn ĝis la 15-a de junio 1992. Kaptu la unikajn okazon familiariĝi kun Ĉinio kaj ties rapide kreskanta Esperanto-movado!

